


# EL POPOLA ĈINIO


N-ro 2 Februaro 1969

# Vortoj de Prezidanto Maŭ

Subeniro de la vastaj amasoj de kadroj al fizika laboro estas tre bona ŝanco de denova lernado por la kadroj, ĉiuj kadroj devas tiel agi, escepte de la maljunaj, malfortaj, malsanaj kaj kriplaj. Ankaŭ la kadroj en ofico devas laŭvice iri suben por fizika laboro.



En la alta tajdo
la granda an-
ĵensalto, Prezi-
nto Maŭ perso-
partoprenis la
andan batalon
nsformi la na-
ron. En la bil-
: Prezidanto
aŭ laboras sur
nstruejo de iu
vokonser ejo.



Prezidanto Maŭ interparolas kun kamparanoj de Janggialing de Jan-an.

Instituciaj laborantoj de Nanŝi-distrikto de Ŝanhajo plenumas la instrukcion de Prezidanto Maŭ, forlasis la oficejon kaj iras al kamparo por labori fizike.



HIANG DONG:


# Ĉiam Konservu la Junecon de Proletara Revoluciulo

*La 7-an de majo 1968, la Revolucia Komitato de Hejlonggiang-provinco fondis agrikulturejon en Liuhe, King-an-gubernio, kaj organizis grandan nombron da kadroj iri tien por fizika laboro. Ĉar tiu agrikulturejo estas fondita laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ farita en "la 7-a de majo", tial ĝi portas la nomon Kadra Lernejo " La 7-a de Majo".*

*En la triumfa kanto por batalakiri kompletan venkon de nia granda proletara kultura revolucio, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris denove:* **"Subeniro de la vastaj amasoj de kadroj al fizika laboro estas tre bona ŝanco de denova lernado por la kadroj, ĉiuj kadroj devas tiel agi, escepte de la maljunaj, malfortaj, malsanaj kaj kriplaj. Ankaŭ la kadroj en ofico devas laŭvice iri suben por fizika laboro."** *Tiu instrukcio de Prezidanto Maŭ havas tre grandan signifon por kontraŭbatali kaj preventi reviziismon kaj por bone plenumi la taskon de batalo, kritiko kaj reformo. Nur konstante partoprenante fizikan laboron, la kadroj povas eviti al si apartiĝon disde la laboranta popolo,* **"esti kaj gvidanto kaj ordinara popolano"** *kaj ĉiam konservi sian energian kaj viglan revolucian junecon de la proletaro.*

— La Red.

*Sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong, la batalantoj de la Kadra Lernejo "La Sepa de Majo" de Liuhe antaŭenmarŝas grandpaŝe laŭ la granda instrukcio donita de Prezidanto Maŭ je la sepa de majo.*



## BRILA STARTO

La ruĝa suno leviĝas en la oriento, kaj unu skarlata flago flirtas en la aero. La lernantoj de Kadra Lernejo "La 7-a de Majo" de Liuhe marŝas antaŭen laŭ la brila vojo, renkonte al la hela sunlumo de la penso de Maŭ Zedong.

Sur la herbejo ĉe la bordo de la rivero Liuhe, staras sur la plej alta loko maljuna, grizhara paŝtisto kun ruĝe radianta vizaĝo en kamparana vesto, kiu sub la sunbrilo kaj en la freŝa vento rigardas bonhumore al la neĝblanka ŝafaro sinpaŝtanta. De tempo al tempo li varme salutas al preterpasantaj komunumanoj aŭ interŝanĝas intime kelkajn vortojn. Sen alies konigo, neniu povas scii, ke tiu modesta maljuna paŝtisto estis antaŭa vicĉefkomitatano de la Ĝenerala Laborista Sindikato de Hejlonggiang-provinco kamarado Ven Ĵonghi, kiu surportis drapajn vestojn kaj veturis aŭtomobile.

Iu demandis lin: "Ĉu nia vilaĝa vivo ne estas peza por vi, maljuna Ven?"

"Ne! La nuna vivo ŝajnas peza, se oni komparas ĝin kun la antaŭa vivo grandsinjora fari nur ordonojn kaj preni manĝon aŭ trinkon ĝisbuŝe pretigitan, sed mi trovas en la nuna vivo la dolĉon kiel pli bone fari revolucion sekvante Prezidanton Maŭ." Lia elkora respondo montris la profundan signifon de la partopreno de kadroj en fizikan laboron.

Kiam oni laŭdis lin, ke li sentimente alproksimiĝas al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, li ripetade diris: "Tute nesufiĉe ankoraŭ, mi faris en tio nur la unuan paŝon."

Maljuna Ven estas veterana kadro, kiu partoprenis la revolucion jam pli ol 30 jarojn. Antaŭe li estis ŝafpaŝta knabo kaj multe suferis la subpremon de bienuloj. Estas Prezidanto Maŭ, kiu lin savis el la maro de amaro kaj kondukis lin al revolucio.

*Anoj de la kadra lernejo marŝas al sovaĝejo kaj virgaj montoj kunportante la revolucian trezoran libron kaj pakaĵon.*



*Lernantoj vizitas familion de maljuna malriĉkamparano kun deziro esti lernantoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.*



Post la venko de la revolucio, lia pozicio ŝanĝiĝis. Sub la veneno de la reviziisma kadra linio de Liu Ŝaŭki, la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon, renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo, havante dignan oficon kaj altan salajron, li vivis komforte, forgesis la ripetadan instruon de Prezidanto Maŭ, kaj estis venkita de sukertegita obuso. Li opiniis ke iom frandi, iom drinki kaj iom amuziĝi por li estas meritinde. Sed fine vekis lin la granda proletara kultura revolucio. Sub la edukado de serio da plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ kaj helpado de revoluciaj ribeluloj, li likvidis siajn erarojn, surportis sian tornistron kaj venis al Kadra Lernejo "La 7-a de Majo".

En tiu lernejo li reprenis sian paŝtistan vipon, kiun li jam forlasis pli ol 30 jarojn. En iu kunveno pri studo kaj apliko de la penso de Maŭ Zedong, li diris kun senfina animagitado: "Ĉiam, kiam mi paŝtas la ŝafojn, venas al mi la penso: kiom da ŝafpaŝtaj knaboj estas ankoraŭ ne liberigitaj, kial mi ne plu pensis pri revolucio? Tio, kion mi hodiaŭ reprenas, estas ne nur simpla paŝtista vipo, sed ankaŭ la forlasita de mi revolucia tradicio. Se nia amata Prezidanto Maŭ ne pliafoje savis min, mi ja ne scias, sur kian danĝeran vojon mi estus alglitinta. Prezidanto Maŭ jam delonge instruis al ni: **'Ni komunistoj ne celas fariĝi estroj, sed fari revolucion.'** De nun mi strikte sekvos Prezidanton Maŭ por fari revolucion dum la posta duono de mia vivo."

Antaŭe en la jaroj plenaj de militaj fajroj, la vasta revolucia kadraro timis nek penadon nek morton, iris ĉien, kie ilin bezonis laboro, kaj dividis la saman sorton kun la laboranta popolo, spirante la saman spiron kun ĝi kaj havante rilatojn kun ĝi kvazaŭ inter fiŝoj kaj akvo. Nun la lernantoj de Kadra Lernejo plibriligas kaj disvolvas tiun tradicion.

### KLARIĜAS LA DIREKTO

Estis la rikolta sezono de la pasinta jaro.

Aromon elspiris la rizplantoj, kiujn la lernantoj propramane kulturis, kaj sur la kamprando dense kunsidis la rikoltantaj lernantoj de Kadra Lernejo.

Dum laborpaŭzo ili prenis la lokon kiel batalkampon por kritiki la grandan renegaton Liu Ŝaŭki.

Komenciĝis la kritika kunveno. Parolantoj unu post alia kritikis kun granda indigno la ĝisĉielan krimon de Liu Ŝaŭki en opono kontraŭ la partopreno de kadroj en fizika laboro.

Inter la amaso la sidanta kamparandevena ĵurnalisto de la *Hejlonggiang-a Ĵurnalo* kamarado



*Lernantoj rikoltas propramane kulturitajn maizojn.*

Li Guj ne povis plu deteni sian indignon, paŝis antaŭen kaj akuzis: "Liu Ŝaŭki, tiu fiulo ja venenis min ĝismorte. Mi origine estis kampulo kaj laboregis 12 jarojn kiel jardungito, mia familio vivis pli malbone ol brutoj en la malnova socio. Kiam la tuta familio baraktis inter vivo kaj morto, la patrolando akiris liberiĝon, nia amata Prezidanto Maŭ savis min el la maro de amaro. Mi partoprenis la laborgrupon de agrara reformo por batali kontraŭ la bienuloj kaj distribui iliajn kampojn. Pro senlime varma amo al Prezidanto Maŭ, mi lernis kulturon en vespera lernejo kaj verkis artikolojn laŭdantajn Prezidanton Maŭ. Por kulturi min la Partio sendis min lerni en lernejo de laboristaj kaj kamparanaj kadroj. Sed la granda renegato Liu Ŝaŭki disvastigis la nigran penson pri 'famiĝo' kaj 'specialistiĝo', kiu profunde venenis min kaj tiris min sur eraran vojon. Mi plenforte studis librojn por ĉasi kapitalon de 'famiĝo' kaj 'specialistiĝo' super la amaso. Sed ekster mia antaŭa sopiro, ĉasante tiel kaj aliel, mi kaptis al mi nur miopecon kaj neŭrastenion kaj plie estis infektita senscie de la malbonaj kutimoj de malnovaj intelektuloj. Mi devenis de laboruloj, sed ne volis plu proksimiĝi al la laboristaj kaj kamparanaj amasoj. Ĉion ĉi tion ja kaŭzis Liu Ŝaŭki." Kaj li daŭrigis: "Kiam Prezidanto Maŭ faris la grandan alvokon pri **'elitigo de la trupoj kaj simpligo de la administrado'**, strikte sekvante la grandan strategian dispozicion de Prezidanto Maŭ la provinca revolucia komitato fondis Kadran Lernejon 'La 7-a de Majo'. Kvankam mi lernis en ĝi nur kvin monatojn, tamen mi ricevis edukon centoble, miloble pli bonan ol tiun en la lernejo de laboristaj kaj kamparanaj kadroj dum kvin-ses jaroj. En tiu ĉi granda lernejo de fizika laboro klariĝis al mi la ĝenerala direkto, kiun revoluciulo devas teni, nome: neniam forlasi la naturan karakteron de la proletaro kaj ĉiam meti sin inter la amasojn."

Dank' al la revolucia amasa kritiko, ankaŭ tiuj, kiuj antaŭe ne volis resti en la nomita lernejo, ekamis tiun lernejon kaj pretas enradikiĝi kaj flori sur la bordoj de Liuhe.

Dank' al la revolucia amasa kritiko, la batalantoj de Kadra Lernejo amas ankoraŭ pli profunde la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj havas pli klaran direkton.

## SENĈESE ANTAŬEN

Sub la nutrado de la penso de Maŭ Zedong kaj post malfacila entrepreno, la lernantoj de Kadra Lernejo akiris grandan riĉrikolton en agrikulturo kaj flankaj okupoj. Tamen, la rikolto en la ideologio estas ankoraŭ pli granda kaj pli brila.

Iutage en la lastjara aŭgusto, en la lernejo granda oleujo, kiu interne surhavis venenaĵon, devis esti purigita. Kiu eniros fari la laboron, riskos veneniĝon. Tiel leviĝis disputo antaŭ la purigado.

La agrikulturejaj laboristoj diris: "La laboro estas danĝera, lasu nin fari ĝin unue."

Sed la kadroj diris: "Ĝuste ĉar ĝi estas danĝera, do lasu nin eniri. Ni ja venis por fari revolucion; kiel ni povas bone hardi nin, se ni nenion riskas!"

Tion dirante, la lernantoj jam konkure saltis en la oleujon. Inter ili estis kamarado Gaŭ Kian, antaŭe vicĉefsekretario de la kancelario de la propaganda departemento de la provinca partia komitato. Malpli ol unu minuton post sia ensalto, li jam sentis kapturniĝon, ne povis stari firme kaj estis tuj falonta. Li konsciis, ke tio estas simptomo de veneniĝo. Tamen, tuj venis al lia kapo la instruo de Prezidanto Maŭ: **"Ni mortas je inda morto, se ni mortas por la popolo."** Li persistis kunpremante la dentojn. Tio estis en vido de la laboristoj kaj dolore tuŝis ilin en la koro. Tiuj tuj supren tiris kamaradon Gaŭ Kian kaj mem saltis en ĝin. Ĉe tio kamarado Gaŭ ne povis reteni siajn varmajn larmojn. . . , kaj li diris kun emocio post la okazo: "Nur laborante kaj vivante kune kun laboristoj kaj kamparanoj, oni povas sperti la sentimenton de la proletaro; nur metinte sin sur la saman pozicion de la laboranta popolo, oni povas vidi la grandan potencon rezultitan de efektivigo de la plej nova instrukcio de Prezidanto Maŭ kaj de intima ligiĝo kun la amaso."

Ne unuopa estas tia homo kia kamarado Gaŭ Kian, kiu venis de gvida posteno, forĵetis sian altrangulan arogantecon, kaj sin tenas kiel ordinara laborulo! Kvankam kamaradino Ĉen Ŝaŭgian, antaŭe vicĉefkomitatano de la virina federacio de la provinco, jam estas pli ol 40-jara, tamen, por pli bone proksimiĝi al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj por propagandi kaj efektivigi la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ, ŝi meminiciate partoprenis la ensemblon de la penso de Maŭ Zedong organizitan de gejunuloj.

*La lernantinoj prenantaj propramane kulturitajn rafanegojn profunde ekkomprenas la veron, ke laboro kreas la riĉaĵojn.*



Pluvadis plurajn tagojn. La revolucia komitato de la lernejo asignis al la ensemblo gloran taskon fari prezentadon por la kongreso de studaktivuloj de verkoj de Prezidanto Maŭ en King-angubernio. Ĉen Ŝaŭgian pensis ke tio estas bona ŝanco por lernado. La tasko estis urĝa, la loko de prezentado estas je pli ol 70 lioj for de la lernejo, pro la malbona vetero la vojo ne plu taŭgis por aŭto. Kion fari?

Ŝi do rakontis al la gejunuloj, kiel oni disvolvis la spiriton de batalo kontraŭ malfaciloj en la Ĉina Popola Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato en Jan-an, en kiu ŝi siatempe lernis. Kiam ŝi rakontis, kiel Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin siatempe prelegis al la lernantoj, la aŭskultantoj tre emociiĝis kiel ŝi. Ĉiuj brue kriis: "Ni heredu la gloran tradicion de la veteranaj ruĝaj armeanoj, disvolvu la revolucian spiriton grimpi la neĝmontojn kaj trapasi la marĉan herbejon, kaj marŝu al King-an per niaj propraj kruroj!"

Tiel ili suriris la vojon kontraŭ la vento kaj pluvo. Kaj ĉe la kapo, marŝis la veterana batalantino Ĉen Ŝaŭgian, kiu siatempe lernis en la nomita Kontraŭjapana Universitato. La sekvintan tagon post la prezento, ili revenis irante sur la kota vojo kaj propagandis kaj kantis dumvoje. Post tio ŝi diris kun profunda emocio: Estis ordinara afero piediri ĉiutage 80 aŭ 100 liojn dum la periodo de Kontraŭjapana Rezistmilito; sed post la Liberiĝo tiom longan piediradon mi faris ankoraŭ unuafoje! Loĝi en granda domo kaj veturi en aŭtomobilo faras homojn "malsanuloj" kun malviglaj membroj. Ĉifoje, iri ĉi tien por labori fizike kaj iri revolucian vojon revenigas al mi la revoluciulan junecon, kaj mi rekomencis la batalan vivon de revoluciulo.

Galopas la trajno de la epoko de Maŭ Zedong! Senĉese antaŭeniras ankaŭ la lernantoj de Kadra Lernejo "La 7-a de Majo"!

*Lernanto en la kadra lernejo, veterana kadro Ven Jonghi (la unua maldekstre) laboras kaj lernas kune kun junaj revoluciuloj kaj revenas al la revolucia tradicio.*



GIANG FEN:

# Subenirintaj Kadroj en la Kamparo

La multaj subenirintaj kadroj de Fenji-gubernio, Gianghi-provinco de nia lando, respektoplene lernadas de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, dividas dolĉon kaj amaron kun la amasoj kaj klopode konstruas la socialisman novan kamparon kune kun ili. La amasoj ofte diras: "Nun kadroj subeniras al la kamparo, junaj studentoj venas al ĝi, urbanoj transloĝigas siajn familiojn en la vilaĝojn por fariĝi kamparanoj... Ĉion ĉi vidante per la okuloj ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj sentas ĝojon en la koro."

## DISVOLVU LA REVOLUCIAN TRADICION

La komunumoj Dagangŝan, Songŝan, Juankeng k. a. de Fenji-gubernio situantaj en montregiono kun malfacila trafiko estis malnova revolucia bazloko dum la dua enlanda revolucia milito. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de tiu loko havas gloran revolucian tradicion. Post kiam la subenirintaj kadroj venis al tiuj komunumoj, la unua leciono, kiun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj donis al ili, temis pri revolucia tradicio.

La subenirinta junulo Hju Gianguo, kiu aliĝis al Longjuan-brigado de Juankeng-komunumo, longe loĝadis en urbego kaj en la komenca periodo post lia veno al la montregiono, li sentis ke la vivo estas peniga kaj la trafiko estas malfacila, kaj ne kontentiĝis pri sia okupo. Kadro de la brigado Liu Longŝeng, kiu estas familiano de revolucia martiro, do rakontis al li historion pri kontraŭbatalo de la popolo en la malnova soveta regiono kontraŭ "sieĝ-ekstermo" en la pasinteco: Foje, reakciaj trupoj de Kuomintango kun dekmiloj da soldatoj venis ĉi tien por "sieĝ-ekstermo" al la gerila taĉmento. La taĉmento havis nur centojn da anoj, sed ili sagace kaj lerte batis la malamikojn utiligante la montregionan terenon kun malfacila trafiko kaj finfine gajnis venkon. Li diris al Hju Gianguo: "Sen revolucia bazloko, la revolucio ne povis akiri venkon. Hodiaŭ, kvankam la revolucio jam venkis, ni tamen ne devas forgesi la lokon, kie sennombraj revoluciaj antaŭuloj bataladis. Ni povos stari antaŭ ili kun senkulpa konscienco, nur se ni pene konstruos la revolucian bazlokon pli bela." Sub la senĉesa edukado fare de Liu Longŝeng kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, Hju Gianguo komencis starigi proletaran sentimenton al la popolo de tiu loko. De tiam, li, same kiel la aliaj komunumanoj, diligente partoprenas laboron de la brigado, ellitiĝas frue kaj enlitiĝas tre malfrue en ĉiu tago, kaj samtempe aktive partoprenis la konstruadon de ekspoziciejo de klasbatalo kaj memoriga halo de revoluciaj martiroj de la sovet-regiono en tiu loko kaj fervore propagandas la penson de Maŭ Zedong al la vastaj revoluciaj amasoj kaj vizitantoj al tiuj ejoj.

La heroaĵoj de la revoluciaj martiroj profunde edukas la tien subenirintajn kadrojn kaj stimulas ilin kuraĝe sin ĵeti en la klasbatalon en la kamparo. Foje, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris al subenirinta kadro Ven Fengĉun, ke la respondeculo de la revolucia komitato de la brigado estas klasa malamiko enŝteliĝinta en la revolucian vicaron.




*Ili iras al paŝta regiono por partopreni fizikan laboron.*

Ven Fengĉun pensis en si: Tio ja estas plej grava afero. Se la potenco falas en la manojn de malamiko, do la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estos subpremataj kaj persekutataj. Mi ja ne devas rigardi tion senfare. Li do enprofundiĝis en la amasojn por esplorado kaj enketado. Akirinte grandan kvanton da materialo, li fine eltiris, kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, tiun klasan malamikon enŝteliĝintan en la revolucian vicaron kaj firmigis la revolucian komitaton de la brigado.

## FORĴETI LA "MANDARENAN" SINTENON KAJ VOLONTE ESTI LERNANTO

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: **"Subeniro de la vastaj amasoj de kadroj al fizika laboro estas tre bona ŝanco de denova lernado por la kadroj."**

Ke tiu ĉi instrukcio de Prezidanto Maŭ estas senkompare saĝa, la subenirintaj kadroj de Fenji-gubernio profunde komprenis en la praktiko.

La subenirinta kadro Luo Hiaŭjun en Hiatang-brigado de Janggiang-komunumo estis multe suferinta knabo en la malnova socio kaj iam laboris ĉe bienulo kiel jara dungito. Li liberiĝis nur post la alveno de la Komunista Partio. En la movado de agrara reformo, kun firma starpunkto kaj klaraj amo kaj malamo li firme staris ĉe la flanko de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, batalis kontraŭ la bienuloj kaj dividis iliajn kampojn. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj fidis lin, subtenis lin, elektis lin kiel estron de la milica taĉmento, poste elektis lin kiel laboranton en la distrikta kaj gubernia registaroj kaj finfine li fariĝis vicestro de popola komunumo. Ricevinte altrangan oficon, li iom post iom disiĝis de la amasoj. Vidante ke li ŝanĝiĝas tagon post tago, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj tre maltrankviliĝis.

En 1968, Prezidanto Maŭ donis la grandan instrukcion pri subeniro de kadroj por partopreni fizikan laboron, kaj Luo Hiaŭjun revenis al sia hejmvilaĝo kaj partoprenis produktan laboron de Hiatang-brigado. En la komenco, li ne povis liberiĝi de la penso, ke reveni hejmen partopreni fizikan laboron post kadriĝo estas malhonoro. Tial dum laboro li ĉiam laboris silente en solo kaj ne volis kunesti kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Komunumano Ĉen Gengcaj, kiu estis dungita kampulo en la malnova socio, travidis lian penson, speciale vizitis lian hejmon, rememoris kun li la historion de la vilaĝo kaj tiun de lia familio kaj faris komparon inter la nuntempo kaj la pasinteco.

Antaŭ la Liberiĝo, la loĝantoj de Hiatang-vilaĝo estis plejparte malriĉkamparanoj kaj dungitaj kampuloj. Tiam la 42 familioj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj havis nur 3 plugajn bovojn kaj 24 muojn da sterilaj kampoj. Multaj laboris por bienuloj kaj kulakoj kiel jaraj dungitoj kaj estis traktataj kiel ŝarĝbrutoj; kaj iuj havis nenion por manĝi aŭ por sin vesti kaj devis migradi por almozado. En la jaro 1948, filineto de Luo Hiaŭjun mortis de malsano en malsato kaj frosto. En la jaro 1949, liberiĝis Hiatang. Por ĉiam forpasis la tagoj de suferoj. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj marŝas sur la socialisma ŝoseo strikte


sekvante la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ. La iama dungita kampulo Luo Hiaŭjun fariĝis vicestro de popola komunumo kaj lia politika pozicio kaj ekonomia stato multe ŝanĝiĝis...

Aŭskultante la rakonton de Ĉen Gengcaj, Luo Hiaŭjun pensadis pri la ŝanĝiĝo de sia penso en la lastaj jaroj kaj profunde sentis, ke li forgesis sian originon kaj la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn, kiuj kune kun li travivis malfacilegojn kaj bataladis. Se nia amata Prezidanto Maŭ ne donus la instrukcion, ke la kadroj subeniru por fizika laboro, li eble iom post iom glitus sur la eraran vojon de reviziismo. Li tuj diris al Ĉen Gengcaj, ke li nepre ŝanĝos sian malnovan stilon de disiĝo de la amasoj, ĝisfunde remuldos sian malnovan penson kaj revoluciados ĝisfine sekvante Prezidanton Maŭ.

Nun, Luo Hiaŭjun ĉiutage persiste laboras, studas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj interkonsiliĝas pri laboroj kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ĉiufoje kiam li ekhavis libertempon, li vizitis iliajn hejmojn por kolekti iliajn kritikojn pri li, kaj se li trovis, ke ili havas malfacilojn, li tuj donis al ili sian helpon. Lia koro denove kuniĝis kun tiu de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Ĉe iuj el la subenirintaj kadroj formiĝis la malbona stilo de malestimo al laboro kaj apartigo de teorio kaj praktiko, pro longtempa disiĝo de fizika laboro kaj la laboranta popolo. Subenirinta kadro Jang Ĉeng estas diplomito de agronomia kolegio. Antaŭ sia subeniro, li ĉiam opiniis, ke li havas pli multe da scio ol la kamparanoj. Foje, la forstkulturejo de la komunumo sendis lin en la gubernian urbon por aĉeti spinacajn semojn, sed li misaĉetis aliajn semojn. Iun alian fojon, kiam li laboris ĉe la forstkulturejo, li ne povis rekoni tearbon. Dum ripozo, malriĉkamparano Li Heji, estro de la revolucia komitato de la forstkulturejo, havis korverŝan interparolon kun li kaj inspire komprenigis al li, ke li devas interligi teorion kun la praktiko laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ kaj humile lerni de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Kaj krome, Li Heji ĉie klopodis lin inflùi kaj eduki per siaj agoj. Foje Li Heji iris kun Jang Ĉeng al la kampoj por instrui al li la metodon de arboplantado. Finparolinte pri la teorio, li persone faris praktikan demonstradon. Tion rigardante, Jang Ĉeng kapbalancadis dirante: "Tiel donitan lecionon oni povas tuj kompreni." Li eksentis, ke li fakte scias nenion, kompare kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. De tiam li formetis sian kos-

*Subenirintaj kadroj konstruas ŝtupkampojn kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.*



tumon de studento kaj surmetis veston el kruda ŝtofo. Dum laboro, li ĉiam prenas por si la pezajn laborojn kaj petas klarigon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiam li trovis ion nekomprenebla. Nun li jam ellernis la ordinarajn terkulturajn laborojn.

## KONSTRUI SOCIALISMAN NOVAN KAMPARON

En Jangkiaŭ-komunumo de Fenji-gubernio estas antaŭiranta brigado fame konata tra la tuta provinco, nome Gianpi-brigado. Nun preskaŭ ĉiutage troviĝas vizitantoj al ĝi. Sed antaŭ ne longe ĝi ankoraŭ estis postiĝinta brigado. Parolante pri la ŝanĝiĝo de la brigado, la membroj diris laŭde: "Ja saĝega estas la instrukcio de Prezidanto Maŭ pri subeniro de kadroj, dank' al kuna klopodo de la kadroj kaj ni mem, ni jam sukcesis forĵeti la nomon de postiĝinteco."

Zeng Longkjuan kiel subenirinta kadro venis al Gianpi-brigado. Baldaŭ post sia alveno, li trovis ke la revolucio kaj produktado de tiu brigado iras malpli bone ol tiuj de aliaj brigadoj. Li pensis, ke li estas revolucia kadro longe edukita de la Partio kaj havas la devon bone konstrui Gianpi-brigadon kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, sed kie kuŝas la kaŭzo de la postiĝo de la brigado? Kaj de kie oni devas komenci por ŝanĝi la postiĝintecon? Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **"tuj venos efiko post ekteno de la klasbatalo"**, kune kun la aliaj subenirintaj kadroj li organizis la vastajn revoluciajn amasojn levi altan tajdon de revolucia amasa kritikado. La revoluciaj amasoj unuflanke forte kritikis la "teorion pri estingiĝo de klasbatalo" de la enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon n-ro unua Liu Ŝaŭki, aliflanke plene malkovris la klasbatalon en la brigado kaj finfine eltiris historian kontraŭrevoluciulon, kiu enŝteliĝis en la revolucian vicaron kaj uzurpis la oficon de sekretario de la brigada partia filio, kaj nombron da sociaj feĉuloj kiujn li flegadis kaj metis sur gravajn poziciojn. Tiu plenmano da klasaj malamikoj longe agadis en koluzio, freneze disvendis la nigrajn varojn de Liu Ŝaŭki, la enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon n-ro unua, nome "plivastigon de la parceloj por privata uzo kaj la liberaj merkatoj, pliigon de etaj entreprenoj memrespondecaj pri la propraj profitoj aŭ perdoj kaj la fikson de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado", kaj "liberon de uzuro, liberon de dungo de laboristoj, liberon de vendo kaj aĉeto de tero kaj liberon de privata entreprenado", ekzemplodone plivastigis siajn private kulturatajn parcelojn, disvolvis kapitalisman entreprenon kaj subfosis la socialisman kolektivan ekonomion. La vivecaj faktoj de klasbatalo profunde edukis la vastajn revoluciajn amasojn, kaj ĉi tiuj diris: "La kaŭzo de la postiĝinteco de Gianpi ja kuŝas en tio, ke klasaj malamikoj kaŝe subfosis." Kun la pli kaj pli profundiĝanta revolucia amasa kritikado, la politika konscio de la revoluciaj amasoj rapide plialtiĝis.

Dume, kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj Zeng Longkjuan energie aranĝis studrondojn de la penso de Maŭ Zedong, kaj pliapaŝe certigis la efektivigon de la granda instrukcio de Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion, stimuli la produkton"** tra batalo kontraŭ egoismo kaj kritiko kontraŭ reviziismo. La amasoj rapide mobiliziĝis. Konkure ili sin ĵetis en la batalon por ŝanĝi la postiĝintecon de Gianpi.

En studrondo, malriĉkamparano Huang Higin diris: "Ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj decideme iros la socialisman vojon sekvante Prezidanton Maŭ kaj neniam lasos Liu Ŝaŭki trompi nin!" Kaj krome, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kritikis la absurdajn sensencaĵojn distrumpetitajn de Liu Ŝaŭki kiaj "laborpoentoj en komando" kaj "materia stimulo", alprenis la antaŭirantan metodon de registro de laborpoentoj laŭ mempropono kaj komuna prijuĝo kaj altigis la laboran aktivecon de la komunumanoj. En la pasinteco, Gianpi-brigado ofte ne povis plenumi sian produktan planon kaj bezonis helpon de aliaj brigadoj, sed en la jaro 1968, tiu brigado ne nur plenumis sian taskon de rizplantado 8 tagojn antaŭ la fiksita dato, sed eĉ helpis siajn najbarajn brigadojn per pli ol tricent labortagoj.

La revolucio antaŭenpuŝis la produktadon, kaj prospera sceno aperis ĉe Gianpi-brigado. En 1968, la rikolto de tiu brigado superis tiun en ĉiu ajn pasinta jaro.

La subenirintaj kadroj en Fenji-gubernio estas antaŭenmarŝantaj por konstrui socialisman novan kamparon, renkonte kontraŭ la ŝtormo de klasbatalo!

# "Maljuna Guo Ligiĝas kun Ni Koro kun Koro"

EN Ninggang-gubernio ĉe la piedo de la revolucia lulilo Ginggang-montaro cirkulas multaj rakontoj pri intima ligiĝo de kamarado Guo Deĵun, ĉefkomitatano de la gubernia revolucia komitato, kun la amasoj kaj lia penado en profundiĝo en la amasojn. Multaj malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj amasoj laŭdis: "Samkiel la kadroj de la iama registaro de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, Maljuna Guo ligiĝas kun ni koro kun koro." Gajni tian laŭdon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ja estas granda kuraĝigo por kadro.

### IRI EN LA AMASOJN

Guo Deĵun devenis de familio de malriĉa kamparano. Antaŭ dudek jaroj, kun profunda malamo al la bienularo kaj kuomintanga reakciularo, li partoprenis revolucion kaj kreskis de ordinara soldato ĝis sekretario de gubernia partia komitato. Sed kun la ŝanĝiĝo de lia pozicio ŝanĝiĝis ankaŭ liaj pensoj kaj stilo de agado. Li ne ĉiam bone memoris la instruojn de Prezidanto Maŭ kaj ne plu disvolvis la revolucian tradicion de penema luktado, tial li ne povis rezisti kontraŭ atakoj de la burĝara ideologio. Fariĝinte sekretario de la gubernia partia komitato, li pli ofte vivis en urbo kaj malpli ofte iris al kamparo; li pli ofte restis en la oficejo kaj malpli ofte vizitis la amasojn. Konsekvence lia rilato kun la amasoj ĉiam pli malintimiĝis. En la granda proleta kultura revolucio, la vastaj revoluciaj amasoj kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj pacience donis al li edukon kaj helpon, kaj tio forte vekis lin. Li ekkonis, ke la ĉefa el ĉiuj liaj eraroj kuŝas en lia disiĝo de la amasoj. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ **"Vi devas teni politikon en komando, iri en la amasojn, kaj pli bone konduki la grandan proletaran kulturan revolucion kune kun la amasoj"**, Guo Deĵun iris en la amasojn kunportante la kvar volumojn de revoluciaj trezoraj verkoj de Prezidanto Maŭ kaj sian tornistron. Li faris viziton al la dek popolkomunumoj kaj la ŝtata agrikulturejo en la gubernio. Al tiuj institucioj, kie troviĝis plej multe da opinioj kontraŭ li, li speciale iris por serioze aŭskulti la kritikojn de la amasoj kaj fari sinceran memekzamenon pri siaj eraroj, kaj samtempe li aktive parto-

*Membro de revolucia komitato estas inter malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.*



prenis la grandan proletaran kulturan revolucion kune kun la amasoj. Tiamaniere li rapide gajnis de ili pardonon kaj fidon. Dum la fondiĝo de la gubernia revolucia komitato li estis unuanime elektita de la amasoj kiel ĝia ĉefkomitatano. Kun eksterordinara emocio kamarado Guo diris: "Mi por ĉiam tenos la instruojn de Prezidanto Maŭ en mia memoro kaj neniam disiĝos de la amasoj."

Nun, Guo Deĵun pasigas plejparton de sia tempo en la amasoj, kaj pro tio la lastaj intime nomas lin "maljuna Guo". En sia oficejo li ĉiam tenas sin kiel ordinara laboranto, donas modelan ekzemplon kaj antaŭiras en ĉiu afero. Kiam li venas al la kamparo, li manĝas, loĝas kaj laboras kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj tiuj tre volontas elverŝi al li sian koron. Por pli bone proksimiĝi al la amasoj, dum la granda kultura revolucio li translokigis sian familion al iu produkta brigado en la antaŭurbo, tiel ke li povas vivi ĉiutage inter la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj liaj pensoj kaj sentoj iom post iom kunfandiĝas kun tiuj de la lastaj.

Dum la intima ligiĝo kun la amasoj Guo Deĵun profunde komprenis, ke tenante ligon kun la amasoj oni estas ĉiam nevenkebla, alie oni sukcesos fari nenion.

## ĈIAM POR LA AMASOJ

Guo Deĵun foje laboris en Hiegia-brigado por akiri praktikan sperton, kaj ĝuste tiam maljuna malriĉkamparano Ĝang Hajkjuan mortis de malsano. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ **"Se iu en vilaĝo mortos, oni okazigu funebran kunvenon. Per tio ni esprimu nian kondolencon kaj unuigu la tutan popolon."** li kune kun la kadroj kaj brigadanoj okazigis funebran kunvenon por la maljunulo.

Ĉe tiu kunveno la brigadestro rakontis la vivon de la mortinto. Per lia historio Guo Deĵun ankaŭ faris komparon inter la malnova kaj nova socioj, rememorigante la pasintan amaron kaj atentigante pri la nuna feliĉo, kaj tiel donis vivan klasan edukon. Poste li kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj enterigis la kadavron de Ĝang Hajkjuan. Ĉion ĉi la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaptis per la okuloj kaj notis en la koro. Premante la manon de Guo Deĵun iu maljuna malriĉkamparano diris kun granda emociiĝo: "Vi ja estas bona kadro de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. En la malnova socio neniu zorgis la aferon postmortan de malriĉuloj. Sed nun oni tiel bone aranĝas eĉ funebron por maljunaj vidvoj kaj vidvinoj mortintaj. Tio ja estas rezultita de la bona gvido de Prezidanto Maŭ!" Tiu maljuna malriĉkamparano en emociiĝo laŭte kriis: "Vivu Prezidanto Maŭ! Longe, longe vivu Prezidanto Maŭ!"

Guo Deĵun persistas konstante partopreni la kolektivan produktan laboron laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **"Partoprenante kolektivan produktan laboron, la kadroj tenas plej vastan, konstantan kaj intiman ligon kun la laboranta popolo".** Iufoje li venis al Dagiangbian-brigado partopreni produktan laboron kaj ricevis ĝojan bonvenigon de komunumanoj de la brigado. Konsiderante ke lia sanstato estas nebona kaj cetere li malmulte laboris pasinte, oni asignis al li facilan laboron. Tion li ne konsentis kaj insiste alprenis plugan laboron. Post kiam li laboris malpli ol du horojn, trovinte lin tre laca, maljuna malriĉkamparano Ven Ĝonghaj konsilis al li ripozon kaj laŭdis, ke li meritas la nomon de bona kadro de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Post reveno de la laboro lia koro longe ne povis trankviliĝi. La profunda klasamo de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj stimulas lin senĉese antaŭen.

En la ĉiutaga laboro Guo Deĵun ankaŭ tre zorgas la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn. Foje trapasante Menkoŭ-brigadon, li trovis, ke tie tri lignopontoj estas faligitaj de inundo, pro kio la malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj iliaj infanoj devis vadi tra la akvo aŭ ĉirkaŭiri, dum ili iris al laboro, foiro aŭ lernejo. Tio estis neoportuna kaj povis estigi danĝeron. Rimarkinte tion li tuj konsiliĝis kun kamaradoj de la revolucia komitato de la komunumo por kune solvi la demandon. Homfortoj estis mobilizitaj kaj organizitaj kaj la pontoj rapide riparitaj. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj laŭdis: "Maljuna Guo ja pensas pri kio ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj pensas, kaj urĝiĝas pri kio ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj urĝiĝas. Li tutkore servas al ni."

## ESTI LERNANTO DE LA AMASOJ

De la praktika laboro Guo Deĵun bone scias, ke por intime rilatiĝi kun la amasoj oni devas havi, antaŭ ĉio, volontan sintenon esti lernanto de la amasoj. Ĝuste tiel agas li en la praktiko.

Inter membroj de la gubernia revolucia komitato estas reprezentanto de laboristoj Tan Zuŝeng. Guo Deĵun ĉiam volontas esti lernanto de Tan Zuŝeng. La lasta estas maljuna laboristo kun aĝo de pli ol kvindek jaroj. Li senlime amas la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj serioze lernas, profunde komprenas kaj firme plenumas liajn instrukciojn. Post kiam li estis elektita kiel membro de la gubernia revolucia komitato, li laboras ankoraŭ kune kun la laborista amaso. De tiu ĉi maljuna laboristo Guo Deĵun lernis multon da noblaj kvalitoj. Ekzemple, Tan Zuŝeng starigis por li bonan ekzemplon per sia rapida batalstilo en komuniko kaj plenumo de la plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ.

Guo Deĵun ĉiam ekzamenas kaj instigas sin, prenante la laboristojn kaj malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn ĉirkaŭ si kiel lernindajn modelojn. Iun fojon Guo Deĵun laboris en Honghing-brigado. Aktive respondante al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion, stimuli la produkton"**, maljuna malriĉkamparano Juan Maŭŝeng konkure faris pezan laboron malgraŭ sia malbona sanstato. La komunumanoj konsilis al li ripozon, sed li diris: "En la batalo por akiri la plenampleksan venkon de la granda proletara kultura revolucio, mi neniel povas resti senfara!" Ĉion ĉi tion Guo Deĵun vidis kaj pripensis. Li konstante prenas la instruojn de Prezidanto Maŭ kiel armilon kaj tiun malriĉkamparanon kiel ekzemplon por kuraĝe konkeri malfacilojn kaj bone plenumi sian laboron. Kiam kamaradoj atentigis lin pri ripozo, li respondis: "Komparante min kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, mi des pli devas labori per duobla forto!"

La labor-taglibro de Guo Deĵun plenas je opinioj, proponoj kaj postuloj de la revoluciaj amasoj. Tiujn li kolektis iom post iom el la amasoj kiel ilia lernanto. Li ofte diras: "Havante tiujn opiniojn, proponojn kaj postulojn de la amasoj, mi povos labori kun pli da certeco kaj fido."

Tiamaniere, decidinte por ĉiam konservi la naturon de laboranta popolo, Guo Deĵun konstante partoprenas fizikan laboron kiel ordinara laborulo.


# Ĉiam Esti Ordinara Popolano

JONGĜONG

EN la granda proletara kultura revolucio, kamarado Ĉen Jongguj, la sekretario de la partia filio de Daĝaj-brigado, estis elektita kiel vicĉefkomitatano de la Revolucia Komitato de Ŝanhi-provinco kaj ĉefkomitatano de la Revolucia Komitato de Hijang-gubernio.

Kvankam ŝanĝiĝis la pozicio kaj ofico de k-do Ĉen Jongguj, tamen li tenas la naturan karakteron de laboranta popolo.

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Daĝaj diris: "Estante kiel vicĉefkomitatano de la provinca revolucia komitato, Jongguj tenas sin kiel antaŭe, kia ni kampuloj."




*En la ĝoja tago de celebrado de la deka datreveno de popolkomunumigo, Ĉen Jongguj (la tria de maldekstre en la unua vico) lernas la brilan verkon de Prezidanto Maŭ* Organiziĝu *kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj interparolas kun ili pri la grandaj atingoj de la popolaj komunumoj en la pasintaj dek jaroj.*

Kiam k-do Ĉen Jongguj prenis sur sin la gvidan laboron en la provinco kaj gubernio, li estis kaj ĝoja kaj maltrankvila. Ekvenis al li en la kapon "timo".

Kion li timas, estante homo kuraĝa kaj senegoisma?

K-do Ĉen Jongguj pensis en si: de pli ol dek jaroj, strikte sekvante la vojon montritan de Prezidanto Maŭ, persistante en la socialisma direkto kaj la kolektiva produktado, la partia filio de Daĝaj sin apogis sur la propraj fortoj en konstruado de nova Daĝaj, tiel ke al ĝi okazis grandaj ŝanĝiĝoj. Kiom ajn ŝanĝiĝis Daĝaj, ne ŝanĝiĝis la natura karaktero de laboranta popolo propra al kadroj, nek la sistemo de partopreno de kadroj en kolektiva produkta laboro, nek la stilo de partopreno en kaj gvido de produktado. Ĝuste pro tio, la gvida kolektivo de Daĝaj-brigado havas tre bonan amasan bazon kaj fariĝis la revolucieca gvida kerno de la vastaj amasoj. En la batalo inter la du klasoj, du linioj kaj du vojoj en la kamparo, unuigante ĉirkaŭ si la malriĉkamparanojn, malsuperajn mezkamparanojn kaj la revoluciajn amasojn, la gvida kolektivo de Daĝaj-brigado strikte sekvas Prezidanton Maŭ kaj venke marŝas antaŭen laŭ la vojo de li montrita.

Rememoro vokis lin al la malproksima pasinteco. En la jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito, multaj gvidaj kadroj de nia partio intime vivis, laboris kaj batalis kune kun la revoluciaj amasoj ĉiutage, dividante la zorgojn kaj malfacilojn. Finfine, ili faligis la malamikojn kaj gajnis venkon en la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito sub malfacilaj kondiĉoj. Post la Liberiĝo de nia lando, la pozicioj de iuj kamaradoj, la labora medio kaj materiaj kondiĉoj de la gvidaj organoj multe ŝanĝiĝis. En tiu ĉi nova stato, plimulto de la gvidantaj

kamaradoj eltenis la provadon kaj konservas la revolucian karakteron de proletaraj revoluciuloj. Sed, troviĝas malgranda parto, kiu komencis loki sin alte, longtempe disiĝis de produkta laboro, do ankaŭ de la amasoj kaj perdis ilian konfidon. Ili pretervidis la saĝon kaj talenton de la amasoj kaj nenion ellernis de ili. Fakte, ili antaŭlonge jam perdis la gvidantecon super la amasoj.

En la granda proletara kultura revolucio, ni deprenis la potencon el la manoj de enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Se ni ne faras revolucion en ni mem, forgesas fari fizikan laboron, forgesas la amasojn kaj penigan vivon, ankaŭ ni povos iri la vojon de la potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon! Se la homoj turniĝos al reviziismo, do la Partio ŝanĝos sian karakteron, la patrolando ŝanĝos sian koloron, kaj la proletaro perdos sian regpotencon! Kiam li pensis pri tio, en lia kapo ekaperis "kvar timoj", t. e. timo al disiĝo de la amasoj, timo al privilegiiĝo, timo al malŝparo kaj timo al malofta partopreno en fizikan laboron.


Sub tiaj "timoj", en la tempo, kiam li ekprenis sur sin la devon de vicĉefkomitatano de la provinca revolucia komitato kaj la ĉefkomitatano de gubernia revolucia komitato, li esprimis al la gvidaj kamaradoj de la supera instanco, ke li prenos la laboron, sed estu garantiata ĉiurimede, ke li povu konstante partopreni kolektivan produktan laboron kaj intime ligiĝi kun la amasoj, por ke li povu ĉiam konservi la naturan karakteron de laboranta popolo kaj neniam degeneri.

Tial, kiam li forlasas Daĝaj por fari ian aferon aŭ kunveni aliloke, li ofte legas absorbite el la ruĝa libro *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* jenan citaĵon **"Estas necese persisti pri la sistemo de la partopreno de kadroj en kolektiva produkta laboro. La kadroj de niaj partio kaj ŝtato estas ordinaraj laboruloj kaj ne grandsinjoroj rajdantaj sur la nuko de la popolo. Partoprenante kolektivan produktan laboron, ili tenas plej vastan, konstantan kaj intiman ligon kun la laboranta popolo. Tio estas granda afero de fundamenta graveco por socialisma sistemo; ĝi helpas venki burokratismon kaj preventi reviziismon kaj dogmismon."**

Legante la konstantan instruon de Prezidanto Maŭ kaj rememorante sian amaran familian historion, k-do Ĉen Jongguj avertis sin mem: Jongguj, ho Jongguj, vi devenis de familio de laboranta popolo, do ne forgesu partopreni fizikan laboron! Forgeso de fizika laboro signifas forgeson de via deveno, kaj vi estos ne plu kalkulebla kiel laborulo. En Daĝaj ne estas kadroj, kiuj ne partoprenas la

*Ĉen Jongguj (la montranto) venis al Sandu-komunumo kaj studas planon pri konstruo de kampoj sur la montoj kune kun ĝiaj kadroj.*





*Kamarado Ĉen Jongguj (la unua dekstre en la fronto) iras fari kamplaboron kune kun la komunumanoj.*

fizikan laboron. Kiu ne partoprenas la fizikan laboron, tiu ne povas esti bona kadro.

Kion k-do Ĉen Jongguj pensas, tion li faras. Kiel ajn li estas okupata, li klopodas elpremi tempon por partopreni fizikan laboron. Iam, kiam ĉeestante kunvenon aŭ laborante en alia loko li trovas kelktagan intertempon, li ankaŭ revenas al Daĝaj por partopreni fizikan laboron. Kiam li kunvenas en la gubernio, li malofte tranoktas tie. Eĉ kiam li revenas hejmen preskaŭ vesperiĝe, li ankoraŭ iras labori por kelka tempo en kampo. Iutempe, li iras al la gubernia urbo por ĉeesti kunvenon post vespermanĝo kaj revenas hejmen en profunda nokto, li same laboras en kampo frue en la sekvanta mateno. En Daĝaj, li ordinare uzas paŭzojn en mateno, vespero kaj tagmeza ripozo por plenumi sian gvidan taskon, ŝparante tempon por la fizika laboro.

K-do Ĉen Jongguj ofte diras: "Ju pli da tempo oni elpremas por fizika laboro, des pli da fortoj oni trovas por preventi maldiligentecon; ju pli da fojoj oni partoprenas kolektivan produktan laboron, des plian gradon da ruĝa koro oni havas por servi al la popolo; ju pli da ŝvito oni verŝas en laboro kune kun la komunumanoj, des pli kreskas al ili la revolucia sentimento de la proletaro. Tiamaniere, kun paso de la tagoj, oni povos konstrui al si bastionon kontraŭ reviziismo, por preventi apartiĝon de fizika laboro kaj popolamasoj kaj defendi la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ."

Ŝarĝita per pluraj oficoj, k-do Ĉen Jongguj estas tre okupata. Ekde la granda proletara kultura revolucio, al Daĝaj faris viziton pli ol 1,700,000 homoj el diversaj lokoj de la lando kaj pli ol 3,000 fremdlandaj gastoj el pli ol 80 landoj. Multan tempon li devis uzi por intervidiĝi kun la vizitantoj kaj akcepti la fremdajn gastojn; precipe post kiam li prenis sur sin la gvidan laboron en la provinco kaj la gubernio, multaj kamaradoj de la provinco, subprovinco kaj gubernio devas ankaŭ okupi lian tempon por kune studi laborojn kun li, kaj li devas krome ĉeesti multajn gravajn kunvenojn.

Okupate de tiaj komplikaj laboroj, k-do Ĉen Jongguj tamen ĉiam konservas sian bonan laborstilon de profunda eniĝo inter kaj intima ligiĝo kun la amasoj, ne dronante en la interimplikitaj bagateloj.

En februaro de 1967, post venka depreno de la regpotenco en Hijang-gubernio, multaj taskoj atendis la plenumon de la gubernia organo, sed, k-do Ĉen Jongguj neniam sidis en oficĉambro, escepte pro ĉeesto de iuj gravaj kunsidoj.


En pli ol 40 tagoj de la lasta tagdeko de februaro ĝis la komenco de aprilo, Ĉen Jongguj vizitis kune kun kadroj de la gubernia organo dudek popolajn komunumojn de la gubernio portante la *Leteron de la Centra Komitato de KPĈ al la Malriĉkamparanoj, Malsuperaj Mezkamparanoj kaj Diversnivelaj Kadroj de la Kamparaj Popolaj Komunumoj en la Tuta Lando.* Unuflanke farante esploron kaj enketon kaj aliflanke propagandante la instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, ili helpis pli ol 200 brigadajn kadrojn sin levi por enviciĝi inter la revoluciulojn, tiel ke la 415 brigadoj en la gubernio ĉiuj havas sian gvidan kolektivon bone starigitan kun specialaj respondeculoj pri la revolucio kaj produkto kaj pri la movado por lerni de Daĝaj. Post unujara penado, la produkta kvanto de grenoj de Hijang-gubernio kreskis pli ol 40% kompare kun tiu en la jaro 1967.

Kiam k-do Ĉen Jongguj laboras en aliaj lokoj, li atentas ĉiam pri ligiĝo kun la amasoj. En Daĝaj, li ligiĝas kun la komunumanoj kompreneble des pli el koro al koro kaj zorgas ilin pli ol sin mem.

Foje, reveninte de alia loko en Daĝaj, k-do Ĉen Jongguj iris dum manĝado kun sia manĝbovlo al maljuna malriĉkamparanino Song Mianni por babili kun ŝi. Informiĝinte, ke pro malsano al ŝi ne estas facile digesti malmolajn manĝaĵojn, li tuj tenis tion en la koro. Post kelkaj tagoj, li interŝanĝis por la maljunulino 30 ĝinojn da fazeolo kaj petis ŝian familianon mueli ilin en farunon taŭgan por fari vermiĉelon. La maljunulino kun emocio diris: "Jongguj, ho Jongguj! Vi nun devas respondeci pri tiom grandaj aferoj, sed ne forgesis meti en vian zorgon eĉ tian bagatelon, kiun mi diris al vi."

Kunvenante en la urbo, k-do Ĉen Jongguj ĉiam pensas pri la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj komparante sin kun ili en manĝado, loĝado kaj veturado, nome en ĉiuj aferoj. Ekzemple, kiam li loĝas en hotelo por ĉeesti kunvenon, li mendas nur la plej malkarajn manĝaĵojn. Ordinare li silentas pri siaj malgravaj malsanoj. Rimarkante, ke k-do Ĉen Jongguj estas tre lacigita sub la peza tasko, kamaradoj de la kuracejo de la komunumo proponis al li ian fortigan medikamenton. Li firme rifuzis dirante: "manĝi milion kaj partopreni fizikan laboron povas kuraci ĉiujn malsanojn."

K-do Ĉen Jongguj rigore postulis de si mem tiamaniere. Li ĝuste gardas sin en ĉiuj bagateloj kontraŭ korodo de la burĝaraj ideoj por vivi simple kaj modeste ĉiam kiel ordinara popolano.



*Ĉen Jongguj prezentas al vizitantoj grandajn atingojn de la daĝaj-anoj en kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ kaj firma konduko de de klasbatalo.*

# Ordinara Soldato

ĜANJING

DE kiam kamarado Huang Hianghe fariĝis konstanta membro de la Revolucia Komitato de Subprovinco Fu-an de Fugian-provinco, li ĉiam loĝas en kolektiva loĝejo kun aliaj unuopuloj kaj kuŝas sur tabullito, kaj estas konata kiel *laŭ balu** en la revolucia komitato.

Kamarado Huang Hianghe estas vicestro de la politika fako de la Fu-an-a Armea Subprovinco kaj aliĝis al revoluciaj trupoj jam 28 jarojn. En la militaj jaroj li persone partoprenis pli ol 200 batalojn grandajn kaj malgrandajn kaj glore akiris unufoje la titolon de heroo kaj okfoje la titolon de modelo. Kiam li venis al la nomita revolucia komitato, li portis kun si krom verkojn de Prezidanto Maŭ, ankaŭ unu ŝpaton kaj flavan litkovraĵon pakitan kiel tornistron. Li piediris trans montoj kaj riveroj ĝis Fu-an, enportis en la revolucian komitaton la gloran tradicion de *laŭ balu* kaj donis novan ekzemplon al la aliaj.

En la revolucia komitato li loĝas en kolektiva loĝejo, kaj en vilaĝoj li loĝas kaj manĝas ĉe malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Foje, por kontroli la laboron de Ganĝe-brigado en Ganĝe-subgubernio, li iris tien en pluvo kaj atingis la lokon preskaŭ noktomeze. Por ne ĝeni la kadrojn de la brigado, kiuj certe estas lacaj post tuttaga laborado, kiel li pensis, li tranoktis en la oficĉambro de la brigado, uzante du benkojn kiel liton kaj sian pluvmantelon kiel kapkusenon. Kiam la kadroj de la brigado sentis grandan bedaŭron, trovinte lin matene sur la benkoj, li diris ridante: "Pro kio la bedaŭro? Ju pli oni dormas sur benkoj, des pli fortika fariĝas al li la spino!" Koncerne al manĝo, li estas ankoraŭ pli senelekta, li manĝas ĉion, kion manĝas malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj neniam akceptas ion privilegian. Foje, kontrolante laboron en iu popola komunumo, li ne prenis la manĝon speciale preparitan por li de la kadroj de la komunumo, sed iris pli ol dek liojn al iu brigado por tie peti iun maljunan malriĉkamparanon kuiri por li sekbataton. Li diris: "La manĝaĵoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estas plej dolĉaj kaj plej bongustaj kaj ankaŭ plej nutraj. Konstante prenante iliajn manĝaĵojn, oni ne forgesos sian devenon."

Kien ajn li iras, li ĉiam portas kun si la ŝpaton. En la movado de amasa produktado en la periodo de Kontraŭjapana Rezistmilito, li akiris la titolon de laborheroo per la ŝpato; nun li rezistas per ĝi kontraŭ korodo de la burĝara ideologio, por ĉiam konservas la peneman kaj modestan laborstilon. Li firme tenas en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ: "**Partoprenante kolektivan produktan laboron, la kadroj tenas plej vastan, konstantan kaj intiman ligon kun la laboranta popolo. Tio estas granda afero de fundamenta graveco por socialisma sistemo; ĝi helpas venki burokratismon kaj preventi reviziismon kaj dogmismon.**" En la revolucia komitato li ĉiam aktive partoprenas fizikan laboron. En la kamparo li laboras sur kampo kune kun la komunumanoj. Foje, por informiĝi pri la stato de laboroj, li venis al Hiŝan-brigado de Pingfeng-komunumo kaj vidis ke oni ĝuste falĉas rizon en kotaj kampoj. Li tuj demetis sian pakaĵon sur padon kaj iris al la kampo kun refalditaj pantalonoj. La komunumanoj konsilis lin unue iom ripozi post la longa marŝado. "Estas nenia laco!" li diris, "mi jam longe ne venis al via bri-

gado, mi denove agas en altrangula maniero, kaj mi debatos ĝin pere de kuna laborado kun vi." Li eniris la vilaĝon por ripozi, nur post kiam li finfalĉis la rizon kune kun la komunumanoj.

Ĉiufoje, kiam li partoprenas laboron, li prenas ĝin kiel batalon. Li diris ke en la militaj jaroj, lukti per bajoneto kaj mangrenadoj estis batalo, kies celo estis ekstermi malamikojn kun armiloj en la manoj kaj preni regpotencon por la proletaro; nun en la periodo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, ankaŭ la partopreno de la kadroj en kolektivan produktan laboron estas "batalo" kies celo estas rezisti kontraŭ korodo de la burĝara ideologio, oponi kontraŭ reviziismo, ligi la kadrojn intime kun la amasoj kaj firmigi la diktaturon de la proletaro.

Ĉie kaj ĉiam Huang Hianghe montras sin kiel ordinara laborulo antaŭ la amaso kaj efektivigas la instruojn de Prezidanto Maŭ en siaj agoj. Oni vidas tre valoran kvaliton en la persono de tiu veterana batalanto. Foje, li vojaĝis pro ofica tasko kun du aliaj kamaradoj kaj vidis ĉe aŭtobusa stacio iun virinon kun du infanoj kaj du grandaj pakaĵoj kiu iris viziti siajn parencojn kaj ne sciis kion fari post descendo de la aŭtobuso. Huang Hianghe tuj aliris helpi ŝin porti la objektojn. Tre kortuŝite ankaŭ la du aliaj kamaradoj helpis en portado de pakaĵoj kaj infanoj. Tiel ili triope akompanis la virinon ĝis ŝia celloko. Alifoje, li renkontis sur monto maljunulon kun pli ol 50 jaroj, ŝvite vektportantan du grandajn faskojn da lignoj, li tuj alpaŝis kaj portis la ŝarĝon anstataŭ la maljunulo ĝis lia vilaĝo.

Huang Hianghe prenas la komunikon de la plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ al la vastaj revoluciaj amasoj kiel sian plej gravan devon. Tuj kiam li informiĝas pri iu nova instrukcio de Prezidanto Maŭ, li tagnokte vojaĝas trans montoj, de komunumo al komunumo, de montvilaĝo al montvilaĝo, por disporti la instrukcion al familioj post familioj. Vidinte liajn klopodojn trans montoj kaj riveroj, iuj junaj kamaradoj diris al li zorgeme: "Vi estas jam aĝulo, maljuna Huang! Estonte ne iru al la malproksimaj lokoj kaj lasu tiujn lokojn al ni." Sed tiu respondis kun rideto: "Sen longa marŝado la feraj plandoj forĝitaj en sekvado post Prezidanto Maŭ rustiĝus kaj la ruĝa koro provita en militfajro turniĝus al reviziismo."

---

**Ĉinaj vortoj signifas "veterana batalanto de la Okavoja Armeo".*

# KURANTAJ AFEROJ


## DISVOLVIĜAS LA KULTURADO DE LAMINARIO EN FUGIAN

Sub la granda instruo de Prezidanto Maŭ **"... marŝi al ĉiuj lokoj kaj fakoj, kie ili povas disvolvi siajn fortojn, kaj marŝi al profundeco kaj vasteco de produkto"**, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la marbordaj regionoj de Fugian-provinco plenforte disvolvas kulturadon de laminario kaj purpura legomo (*Porphyra tenera*). En 1968 estis akirita senprecedence abunda rikolto de laminario, la totala produktkvanto de sekigita laminario ĉirkaŭ unuoble plialtiĝis ol tiu de 1967, pli ol duoble plialtiĝis ol tiu de 1966, kaj ankaŭ la kvalito estas multe altigita. Tie oni jam komencis rikolti purpuran legomon. Kaj la totala produktkvanto de sekigita purpura legomo en 1968 pli ol okoble altiĝis ol tiu en 1967.

## LA UNUA LINA KEMIFIBRA TEKSEJO KOMENCIS PRODUKTON

En la triumfa kanto de la ĉiuflanka venko de la granda proletara kultura revolucio, la unua lina kemifibra teksejo de nia lando — Ĝanggiakoŭ-a Kemifibra Teksejo "La Unua de Julio" konstruiĝis per fluga rapideco kaj komencis sukcese ŝprucigi fibrojn.

Tigo de lino, loka plantaĵo de Ĝanggiakoŭ, estas la kruda materialo de tiu ĉi moderna meza kombinumo, kiu povas produkti 900 tunojn da kemia fibro kaj teksi ses miljon metrojn da ŝtofo. La konstruado komenciĝis je la 1-a de julio, 1968, kaj en malpli ol tri monatoj jam konstruiĝis la ĉefaj laborejoj por solvado, fibroŝprucigado, ŝpinado kaj teksado kaj pli ol 360 meĥanikaj instalaĵoj estas muntitaj per la propraj fortoj.



# Verkoj de Maŭ Zedong

## Broŝure Eldonitaj en Esperanto

(Parto de la Verkoj en la Periodo 1941-1949)

| | |
|---|---|
| Antaŭparolo kaj Postskribo al la *Kamparaj Enketoj* | 16 pĝ. |
| Reformu Nian Studon | 20 |
| Parolado ĉe la Asembleo de Reprezentantoj de la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono | 12 |
| Ĝustigo de la Partia Laborstilo | 36 |
| Kontraŭ Partia Stereotipaĵo | 36 |
| Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an | 60 |
| Kelkaj Problemoj pri Metodoj de Gvidado | 16 |
| Nia Studo kaj la Aktuala Situacio | 32 |
| Servu al la Popolo | 16 |
| Ni Devas Ellerni Ekonomian Laboron | 20 |
| Pri la Ĉongking-a Intertraktado | 40 |
| Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong | 22 |
| La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj | 52 |
| Pri Kelkaj Gravaj Problemoj en la Nuntempa Politiko de la Partio | 20 |
| Daŭrigu la Revolucion ĝis la Fino | 32 |
| Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio | 38 |
| Pri Popol-Demokratia Diktaturo | 32 |
| Komentarioj pri la Blanka Libro | 70 |

Eldonitaj de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Distribuas la Libroservo de la Ĉina Esperanto-Ligo
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

# Alta Produktkvanto de Kotono en Turfan

SUB la gvido de la granda alvoko de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ **"lerni de Daĝaj en agrikulturo"** kaj lia granda principo **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"**, en la jaro 1968, Turfan-gubernio de Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono akiris refojan riĉan rikolton post tri sinsekvaj abundaj rikoltoj en vasta areo.

## KULTURI GRENON KAJ KOTONON POR LA REVOLUCIO

Turfan situas en la nordorienta parto de Hingiang, estas ĉirkaŭata de montaro kun tre aparta natura cirkonstanco kaj fama kiel plej malalta kaj varma kontinenta baseno. Dum tri monatoj en ĉiu jaro, la temperaturo superas 40°C kaj la plej alta atingas 47.6°C, pro tio ĝi estas nomata "fajrujo". Ĉi tie la sunlumo estas abunda, la temperaturo alta kaj la senprujna tempo longdaŭra, tial estas konvene por kresko de ekonomiaj plantaĵoj kia kotono. Post la Liberiĝo oni sukcesis kulturi tie longfibran kotonon, kies kvalito, laŭ ekspertizo de koncerna ŝpinteksa departemento, multe superas tiun de la importita.

Turfan-gubernio estas unu el la lokoj kie oni plej frue ekkulturis kotonon en nia lando. Sed antaŭ la Liberiĝo, pro longdaŭraj kruelaj subpremo kaj ekspluato fare de la feŭda reganta klaso dum multaj dinastioj kaj de la kuomintanga reakciularo, ĉi tie kotonprodukto ĉiam troviĝis en stagneco; kaj krome, pro la individua mastrumado de kamparanoj kaj maldetala zorgado en kultivado, la kotonspecoj estis tre miksaj kaj la produktkvanto tre malalta.

Post la Liberiĝo, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj firme apogante sin sur la kolektiva forto de popolaj komunumoj, la turfanaj diversnaciaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj kadroj sukcesas efektivigi memprovizon de greno eĉ kun superfluo ekde la jaro 1962, kaj la kotonprodukto disvolviĝas jaron post jaro kaj la produktkvanto pluroble kreskis. En 1967, la totala produktkvanto de kotono-fibro atingis pli ol 2,920,000 kg., la meznombra produktkvanto pomua estis 54.4 kg.; la plantareo de longfibra kotono estis je 5,400 muoj pli granda ol tiu de 1966 kaj okupis 68.2% de la totala semareo de kotono de la gubernio.

En la senprecedenca granda proletara kultura revolucio, diversnaciaj revoluciaj popoloj de Turfan starigis pli firme la ideon "terkulturi por la revolucio" kaj decidis pli multe produkti grenon kaj kotonon por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de la patrolando. En 1967, tri junulinoj de la kvara grupo de Ajdinhu-komunumo kun alta volo elmetis batalan sloganon: akiri kotonon el dezerta tero. Ili semis kotonsemojn sur sep muoj kie eĉ sorgo ne povis ĝermi. Ili renkontis malfacilojn de ventego kaj manko de plantidoj, akvo kaj sterko, sed kreive studante kaj kreive aplikante verkojn de Prezidanto Maŭ kaj disvolvante la revolucian spiriton de sinapogo sur la propraj fortoj kaj penemo en batalo, ili fine gajnis bonan rikolton kun pomua produktkvanto de 71.5 kg.

## FOSI KANALON POR KONKERI SABLAN VENTON

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: **"Akvoutiligo estas aorto de agrikulturo".** Turfan estas sekeca regiono. Ĉi tie la jara meznombra kvanto de atmosfera precipito estas nur 16.6 mm,

sed la vaporiĝa kvanto atingas 3,000 ĝis 3,600 mm, plie, dum tuta vintro ne falas neĝo, tial por disvolvi produkton de greno kaj kotono oni nepre devas plenforte entrepreni akvoutiligan konstruon.

Norde de Turfan situas la fama Tianŝan-montaro de nia lando. La ĉielskrapa Bogda-monto estas kovrita de eterna neĝo. La senfina neĝakvo vaporiĝas aŭ tralikiĝas tuj post enfluo en Gobi-dezerton. Jam antaŭ pli ol 100 jaroj, laŭ la klimato kaj aparteco de subtera akvo, la diversnaciaj laborantaj popolanoj de Turfan kreis subteran akvo-kondukan konstruon — subtera kanalo. La skalo de tia sistemo estas tre granda. Ĝi havas longecon de kelkaj ĝis kelkdek kilometroj. Kaj laŭ la kanalo estas fosita multe da vertikalaj putoj. La avantaĝo estas, ke la kanalo estas neatingebla de sunradio kaj la fluo estas simetria, la akvo povas flui en kampojn sen helpo de ajna instrumento.

Nun en Turfan estas fositaj pli ol 500 subteraj kanaloj kiuj irigacias ĉirkaŭ 40% de la totala agraro de la gubernio. La areo de agro kaj forsto de popolaj komunumoj plivastiĝas jaron post jaro, kaj la subteraj kanaloj ne sufiĉis por irigacio. Tial, ekdisvolviĝis grandskala amasa movado de akvo-utiliga konstruado en Turfan. La amasoj defiis neĝkovritan Tianŝan-montaron por preni akvon de la naturo. Inter 1960 kaj 1962 du grandaj kanaloj kun longeco de pli ol 220 kilometroj estis finkonstruitaj. Iliaj branĉoj interplektiĝas en duono de Turfan kiel reto kaj estas ŝanĝita la stato ke ĉi tie oni utiligis antaŭe nur fonton el subteraj kanaletoj.

Ankaŭ Turfan estas fama en Hingiang pro siaj sablaj ventoj. Dum la dek jaroj de 1955 ĝis 1964, en ĉiu jaro blovis ventego, meznombre 31 fojojn, pli forte ol 8-klasa, kaj en 1961 eĉ 68 fojojn. La 31-an de majo 1961, la 15-an de aprilo kaj la 25-an de majo 1963, ĉi tie eĉ furiozis uraganoj pli fortaj ol 12-klasa, maloftaj en la historio.

Por efike jungi venton kaj sablon, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, sekvante la principon "plani ĉiuflanke, reordigi sinteze, difini metodojn laŭ lokaj kondiĉoj, projekti preventojn kontraŭ katastrofoj", la diversnaciaj laborantaj popolanoj de Turfan disvolvis obstinan batalon kontraŭ sabla vento. En 1966, en la granda proletara kultura revolucio, la turfanaj revoluciaj kadroj kaj vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj prenis kiel ekzemplon Giaŭ Julu, la bonan lernanton de Prezidanto Maŭ, kaj la vastajn amasojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Lankaŭ-gubernio de Henan-provinco kie Giaŭ Julu siatempe laboris. Post organizo de fortoj, kunportante la ruĝan libron *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj sekmanĝaĵojn, spite al sabla vento kaj varmego de ardanta somero, ili faris en daŭro de kvar monatoj ĉiuflankan enketon kaj esploron al la lokiĝo, fluodirekto kaj pereiga forto de 1,015 grandaj aŭ malgrandaj dunoj kaj tri enblovejoj de ventego sur la 310,000-mua sabla areo, ellaboris preventan planon kaj tiel antaŭenpuŝis la kontraŭventan kaj kontraŭsablan laborojn de la gubernio.

*Ujguraj komunumanoj rikoltas kotonon.*



Antaŭe, ŝtormo en Turfan-regiono pereigis plantaĵojn pere de fluanta sablo. Kontraŭ tiu stato, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj disvolvis plenampleksan movadon por kontraŭventa ŝirma forstado. En la lastaj jaroj fluge disvolviĝis la kulturado de kontraŭventaj forstoj kaj la totala areo de forstoj jam atingis pli ol 27,000 muojn. El la pli ol 3,000 strioj da forsto kun totala longeco de pli ol 1,200 kilometroj, triono jam montris rimarkindan efikon kontraŭ vento kaj sablo en distanco de 100 metroj. Ko-

munumanoj humure diris: "Nun ni plantis grenon kaj kotonon en tenejon."

## SCIENCA KOTONKULTURADO

En la lastaj jaroj, plenumante la principon "kombini vastigon de kulturareo kun altigo de pomua produktkvanto", la vastaj revoluciaj popolamasoj de Turfan multe altigis la totalan kaj pomuan produktkvanton de kotono. Oni dankas tion ne nur al amasa fundamenta kampa konstruado kaj venko super diversaj naturaj katastrofoj, sed ankaŭ al amasa scienca eksperimento kaj efektivigo de scienca kotonkulturado. Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: **"Klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento estas tri grandaj revoluciaj movadoj por konstrui potencan socialisman landon."** Responde al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, en Turfan estis establitaj 331 kotonkulturaj grupoj de scienca eksperimento en kiuj partoprenis 2,341 personoj, kaj sur la eksperimentaj kampoj kun areo de 4,887 muoj estis kreitaj multaj rekordoj de alta produktkvanto.

La tria grupo de Kvinstela Brigado de Kvinstela Komunumo de la gubernio antaŭe ne donis sufiĉan atenton al scienca eksperimento, tial nova tekniko ne povis esti plene popularigita kaj la kotonprodukto disvolviĝis malrapide. De 1965, en la grupo fondiĝis sekcio de scienca eksperimento de triflanka kombiniĝo kun partopreno de veteranaj kamparanoj, junuloj kaj gvidantaj kadroj. Post konstanta penado ili kreis rekordon de pomua produktkvanto de 136.75 kg. de longfibra kotono. En 1966, la sekcio je 100 muoj plivastigis la areon kaj atingis pomuan produktkvanton de 106.5 kg.

En la procezo de amasa scienca eksperimento, en Turfan oni multe plantis longfibran kotonon kiu havas altan ekonomian kaj uzan valoron. Iuj komunumoj kaj brigadoj kulturas nur tian kotonon kaj el tio akumulis sperton en tekniko pri frumaturigo kaj riĉrikolto. Post disvastigo de tia tekniko, la pomua produktkvanto rapide altiĝis de 20-25 ĝis pli ol 50 kg., kaj ankaŭ la fibra kvalito estas multe plibonigita.

Nun la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Turfan plantas ne nur altproduktan mezmaturiĝan kontinentan kotonon (*Gossypium Hirsutum*) kaj frumaturiĝan longfibran kotonon, sed ankaŭ komencis kulturi frumaturiĝan kontinentan kotonon post rikolto de tritiko. Tiu ĉi sukcesa provo kreos pli vastan perspektivon por stabila altprodukto de kotono en Turfan-regiono.

En la amasa scienca eksperimentado, la vastaj revoluciaj amasoj de scienc-eksperimentaj sekcioj metis la penson de Maŭ Zedong en la unuan lokon en ĉiuj laboroj. Cele al la aktuala ideo, ili ripetade studas brilajn verkojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, batalas kontraŭ egoismo kaj kritikas reviziismon, tiel ke plene noviĝis la spirita fizionomio de homoj.

Ĉe kamarado Sianbajzi, sekciestro de scienca eksperimento de la tria grupo de Kvinstela Brigado de Kvinstela Komunumo, ekzistis ideo pri "laborpoento en komando" pro influo de la privatposedanteca ideologio ekzistinta dum miloj da jaroj kaj veneno de "tri pliigoj kaj unu fikso"* kaj "materia stimulo" energie disvastigitaj de Liu Ŝaŭki. En la unuaj tagoj post veno al la grupo, lin okupis nur la penso labori sur la ĝeneralaj kampoj. Li pensis: "Laborante sur la ĝeneralaj kampoj oni povas gajni multe pli da laborpoentoj." Dank' al la granda proletara kultura revolucio estis plene mobilizitaj la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kiuj en la revolucia amasa kritika movado ĝisfunde kritikis serion da reakciaj absurdaĵoj kiaj "tri pliigoj kaj unu fikso", "kvar liberoj"* kaj "materia stimulo" k.a. distrumpetitaj de Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj, kaj ankaŭ kamarado Sianbajzi multe progresis en la klasa konscio. Kun sia erara ideo, li foje kaj refoje studis la instruon de Prezidanto Maŭ en *Servu al la Popolo*: **"Niaj revoluciaj trupoj . . . ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo kaj laboras senrezerve por la interesoj de la popolo."** La vortoj de Prezidanto Maŭ trafis lin rekte en la koron. Li pensis: Kamarado Ĝang Side batalis por la interesoj de la popolo **"ekskluzive"** kaj **"senrezerve"**, ne ĉasante famiĝon, nek profiton, do kial mi ofte kalkulas nur pri laborpoentoj? Dank' al senĉesa batalo en ideologio, li iom post iom starigis al si ideon "terkulturi por la revolucio", prenante kamaradon Ĝang Side kiel brilan ekzemplon. Dum la lastaj tri jaroj, estante rigora al si mem, li diligente laboris super si en tekniko pri frumaturigo kaj riĉrikolto de longfibra kotono kaj fojrefoje kreis plej altan rekordon de abunda rikolto tiurilate.

Arde disvolviĝas en Turfan la vasta profunda amasa movado lerni de Daĝaj. La vastaj revoluciaj amasoj decidis konstrui Turfan en novan socialisman kamparon kaj brile ruĝan lernejon de la penso de Maŭ Zedong!

---

**Vidu "Enciklopedieton", n-ro 2 de EPĈ, 1968*

GAŬ GJUNHE:

# Nova Moro en Familio

DANK' al la granda proletara kultura revolucio okazis profunda ŝanĝiĝo en ĉiu familio de nia lando. Iun nokton en la domo de onklino Vang Jufeng, en Hiaŭginggoŭ de Jangjuan-gubernio, Hebej-provinco, la kvin membroj de la familio bolis en diskutado pri starigo de nova disciplino de la familio . . .

## MALHARMONIO

En la jaro 1964, la dua filo de onklino Vang edziĝis. Pro influo de malnovaj pensoj kaj feŭdaj moroj, Vang Jufeng, kiel bopatrino, starigis multajn malnovajn regulojn por la novbofilino. Sed la bofilino Ĝang Ĉunmej, kiu naskiĝis kaj plenkreskiĝis en la nova socio, tion tute malaprobis kaj ne volis esti katenita de tiuj "reguloj". Ĉunmej ankaŭ estas aktivulino kaj elektiĝis kiel estrino de la produkta grupo. Ŝi ofte klopodis por la kolektivo, kio eĉ pli multe malplaĉis al la bopatrino. Tial malpaciĝo ofte okazis inter ili.

Foje, Ĉunmej revenis hejmen malfrue post kunveno de la produkta grupo en nokto. Kiam ŝi paŝis en la domon, la bopatrino ekgrumbladis senĉese: "Estante novedzino ci kuradas tien kaj ĉi tien, kiel tage tiel ankaŭ nokte, pro kio scias kiu! Tute sen disciplino!" Tion aŭdinte, Ĉunmej koleriĝis, tuj respondis al ŝi malafable, kaj tiu kverelo inter la bopatrino kaj bofilino maldormigis la familion dum la tuta nokto. De post tiam, la du virinoj rigardis unu la alian kiel makulon en sia okulo kaj dornon en sia karno. Loĝante en du ĉambroj de la sama domo, kun paŭto kaj longigita vizaĝo unu al la alia je renkontiĝo ili ne interparolis dum pli ol tri jaroj. Nenies pacigajn vortojn ili volis aŭskulti kaj nenies admono efikis al ili.

## VEKIĜO

Iutage, Vang Ju-e, la filino de onklino Vang revenis de kunveno de la brigado kun kora ĝojo. Ŝi tuj iris al siaj pliaĝa frato kaj patro, komunikis al ili la alvokon de la brigado pri starigo de familia studrondo de la penso de Maŭ Zedong, kaj interkonsiliĝis kun ili pri tuja starigo de sia familia studrondo por unue solvi la kontraŭdiron inter la bopatrino kaj la bofilino.

Finiĝis la vespermanĝo kaj la studrondo devis ekfunkcii. Ju-e ĝoje diris al sia patrino: "Panjo! Venigu bofranjon, ke ni studu kune?" Tion aŭdinte la onklino eksentis malagrablon kaj rifuzis kategorie: "Kun ŝi via patrino ne volas kune studi! Ŝin vidante mi sentas koleron!" Kaj ŝi diris sekve: "Tio, ke bofilino obeas sian bopatrinon, ja estas tradicia regulo. . . Ĉu eĉ tion ĉi vi ne scias?" Tiam ŝia dua filo Vang Bin ŝin interrompis haste: "Panjo! Kia tradicia regulo? Ĉu en familio de malriĉuloj kiaj ni povis esti tia regulo antaŭ la Liberiĝo? En kia familio povis esti regulo?" La vortoj "antaŭ la Liberiĝo" tuj tuŝis la koron de onklino Vang. Ŝi ekmemoris la tragikaĵojn en la malnova socio kaj nedeteneble komencis rakonti al la aliaj siajn maldolĉajn travivaĵojn en la malnova socio. Ŝi diris malĝojege: "En la malnova socio, nia familio migradis tien kaj ĉi tien, havis nek por manĝi nek por vesti, kaj ni eĉ ne havis propran domon, do kiel ni povus havi regulon?! En aŭtuno de iu jaro, nia tuta familio eksuferis malsaton eĉ tuj post draŝado! Post akuŝo, mi estis malgrasiĝe pala pro malsato kaj ne povis elpremi eĉ guton da lakto. La familianoj povis nenion fari ol lasi la dutagan bebon morti pro malsato antaŭ siaj okuloj. Tiutempe, ni eĉ ne povis vivteni infanon, por ne paroli pri preno de bofilino."

Rememoro pri la pasintaj maldolĉaĵoj vekis la konscion de onklino Vang. Ŝi diris indigne: "En la malnova socio, ĉu povis esti kia ajn regulo por ni malriĉuloj, kiuj eĉ la vivon ne povis teni? Tiuj kiuj 'tenis regulon' estis la gesinjoroj en la domoj de bienuloj kaj lokaj tiranoj, hommanĝaj kaj sangsoifaj! Por preni manĝon ili bezonis nur movi la buŝon, por sin vesti ili bezonis nur etendi la manojn. Ili devigis infanojn el malriĉaj familioj ilin servi kaj se ĉi tiuj nur iom malplaĉis al ilia bontrovo, ili do prenis tion kiel ofendon kontraŭ la familia regulo kaj punis per insultoj aŭ batoj." Tion parolante kaj pripensante, la onklino sentis kaj ekscitiĝon kaj honton. Ŝi diris: "La familio de la bofilino estis same mizera kiel la nia en la malnova socio. Mi devis ŝin eduki per la suferoj en la malnova socio, por ke ŝi bone servu al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, sed mi eraris. Mi pensis, ke mi nun havas bofilinon, mi devas servigi ŝin al mi, ke mi

iom ĝuu la vivon! Mi pensis krome, ke la virinoj devas fari nenion alian ol zorgi pri la hejmaj aferoj, kaj la ceterajn aferojn devas fari la viroj. Ĉio ĉi tio montras, ke mi estis venenita de feŭdaj pensoj. Mi eraris." Tiam la filino Ju-e diris al ŝi: "Panjo! Unuvorte, vi eraris en ĉi tio, ke vi ne aŭskultis la vortojn de Prezidanto Maŭ. En la nova socio, la viroj kaj virinoj havas egalajn rajtojn kaj ĉiuj devas sin dediĉi al la konstruado de socialismo. Prezidanto Maŭ instruas nin: **'La ĉina virinaro estas granda fonto de homa forto. Tiu ĉi fonto devas esti ĉerpata en la klopodo por konstrui grandan socialisman landon.'** Sed vi tamen ankoraŭ rigardas la virinojn el la malnova vidpunkto!" La vortoj de la filino plenigis la patrinon per ĝojo, kaj ĉi tiu diris: "Kara finjo, se vi pli frue helpus panjon legi verkojn de Prezidanto Maŭ, mi ne malpaciĝus kun via bofranjo! Nu, rapidu al ŝi kaj ŝin venigu!"

Dume, la bofilino Ĝang Ĉunmej studis sub lampo la artikolon *Servu al la Popolo*, sidante en la najbara orienta ĉambro, kaj klare aŭdis la interparolon en la okcidenta ĉambro. Kiam ŝi aŭdis en la komenco, ke la bopatrino ne volas studi kune kun ŝi, ŝi murmuris al si malbonhumore: "Vi sentas koleron min vidante, mi ankaŭ sentas koleron vin vidante!" Sekve ŝi preme fermis la pordon kaj ne plu volis aŭskulti. Sed la voĉoj en la okcidenta ĉambro ĉiam pli laŭtiĝis kaj sin trudadis al ŝi, ke ŝi ne povis ne aŭdi plue. Ŝi aŭskultis kaj aŭskultis, kaj la doloraj travivaĵoj de la bopatrino en la malnova socio subite ektuŝis ŝian koron, ke larmoj ŝprucis el ŝiaj okuloj. Tiam ŝi bone ekkomprenis, ke la bopatrino multe suferis de doloroj en la malnova socio kaj estis samtempe venenita de feŭdaj pensoj, ke kiel junulino, ŝi devis ŝin persvadi kaj inspiri per la penso de Maŭ Zedong kaj helpi ŝin akcepti novajn aferojn kaj elimini la malnovajn pensojn, sed ŝi sciis nur respondi al sia bopatrino la malafablaĵon per malafablaĵo. Ŝi pensis, ke ŝi devas respondeci pri la malakordo en la familio. Tiam ŝi sentis, ke ŝi eraris kaj devas tuj iri al la bopatrino por konfesi sian kulpon. Do ŝi rapidis al la okcidenta ĉambro.

## AKORDIĜO

Apenaŭ Ju-e transpaŝis la sojlon, ŝi ekvidis la bofratinon. Ŝi pensis, ke la bofratino intencas forgliti aŭdinte la vortojn de la patrino pri venigo, do ŝi kaptis ŝian manon kaj demandis: "Bofranjo, kien vi iras?" Ĉunmej respondis ekscitiĝe: "Al



*En familia kunveno por "kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon", maljuna heroo Gia Gincaj de Daĝaj-brigado (la tria de dekstre) diras al siaj familianoj, ke ili neniam forgesu la klasajn suferojn kaj la dolĉon hodiaŭan kaj por ĉiam konduku revolucion sekvante Prezidanton Maŭ.*

panjo!" Do ili iris man-en-mane en la okcidentan ĉambron. Tio, kion diris Ĉunmej post ekvido de la bopatrino estis: "Panjo! Mi eraris!..." Tiam onklino Vang profunde kortuŝiĝis kaj interrompis sian bofilinon: "Ĉunmej, ne kulpigu vin; sidiĝu sur la lito, ke vi kvar kune helpu min batali kontraŭ egoismo, por ke mi ŝanĝu la malnovajn pensojn!"

La kvin membroj de la familio ĉiuj sidante sur la briklito entuziasme laŭtlegis citaĵon el verko de Prezidanto Maŭ: **"La unuiĝo de la lando, la solidareco de la popolo kaj la solidareco de niaj diversaj nacioj — jen estas la fundamentaj garantioj por la nepra triumfo de nia afero."**

Fine, la edzo de onklino Vang elmetis novan demandon. Li diris: "Nun en nia familio efektiviĝis 'granda unuiĝo', ni devas de nun detrui la malnovan familian disciplinon kaj starigi novan moron ĉe ni. Kiu mastrumu la domon? Jen estas demando, pri kiu ni devas bone diskuti." Kaj tiu demando levis varman diskuton. Finfine la onklino diris: "Nu, mi proponus jene: Depost nun mastrumu ne mi maljunulino, nek la maljunulo, sed la penso de Maŭ Zedong. Ni agu laŭ la opinio de tiu, kies ideo konformas al la penso de Maŭ Zedong, kaj ni faru konkure tion, kio utilas al la popolo." Tiu propono tuj ricevis aprobon de la tuta familio.

# Abonu

# «EL POPOLA ĈINIO»




«El Popola Ĉinio» estas esperanta monata gazeto kun sinteza enhavo, bildoj kaj koloraj paĝoj.

La gazeto propagandas en diversaj formoj la penson de Maŭ Zedong, raportas brilajn atingojn de nia popolo en la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado sub la eminenta gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Tiuj, kiuj volas aboni la gazeton, bonvolu turni sin al la Libroservo de la Ĉina Esperanto-Ligo (P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio).

Esperantaj kursanoj kaj junaj lernantoj de ĉiuj landoj ĝuas favoran abonon.

Estas bonvene, ke legantoj, kiuj fervore disvastigas nian gazeton, estu niaj perantoj. Tiuj povas rekte kontaktiĝi kun la Libroservo de la Ĉina Esperanto-Ligo aŭ la redakcio de la gazeto.

# Ŝanhajaj Laboristoj Antaŭenmarŝas




Sub la direktado de la penso de Maŭ Zedong la revoluciaj komitatoj en la fabrikoj de Ŝanhajo estas starigitaj unu post la alia, kaj la revoluciaj laboristoj fariĝis veraj mastroj de la fabrikoj. Jen la revoluciaj laboristoj de la Tria Ferŝtala Fabriko de Ŝanhajo ĝoje celebras la triumfan naskiĝon de la revolucia komitato.



La tuta revoluciularo de la tria laborejo de konvertil-forno de la Unua Ferŝtala Fabriko de Ŝanhajo levis alttajdon en **"la tenado de la revolucio kaj stimulo de la produkto"**, sukcesis en la prova produkto de nova speco de ŝtalo kaj antaŭplenumis la taskon liveri helpon al eksterlando. Jen ili sin okupas pri produktado.




La revoluciaj laboristoj de la Unua Valvo-fabriko de Ŝanhajo ludas la rolon de la ĉefa forto en la granda proletara kultura revolucio. Ili akre kritikas la reviziisman linion de Liu Ŝaŭki.



La proletaraj revoluciuloj de la 17-a Koton-ŝpinteksejo de Ŝanhajo disvolvas la kuraĝecon de pensado, agado kaj kreado kaj mem sukcesas projekti kaj fabriki novan instalaĵon, kio multe ŝparas homforton kaj plialtigas produktivecon.



Guo Sanĝen, aktivulino en la kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong en Ŝanhajo, estas juna laboristino de la Ŝanhaja Dizel-fabriko. Ŝi estas fidela al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj elektiĝis kiel ano de la revolucia komitato de tiu fabriko. La foto montras, ke ŝi (la dua de maldekstre) laboras kaj intime parolas kun la gekuiristoj.



# Pri Foiro de Eksportaj Varoj de Ĉinio

FAN ĴONG

PER tute nova fizionomio kaj senprecedenca grandiozeco la Foiro de Eksportaj Varoj de Ĉinio por Aŭtuno 1968 montris la riĉajn fruktojn de la granda proletara kultura revolucio de nia lando al la eksterlandaj amikoj el la kvin kontinentoj, kiuj venis al tiu foiro. De la komenco ĝis la fino la foiro troviĝis en floranta prospereco, kaj la negocsumoj eksporta kaj importa superis tiujn de iu ajn jaro en la pasinteco.

## NOVAJ ATINGOJ EN INDUSTRIA PRODUKTADO

En la halo de industrio estis montritaj multaj novaj produktoj sur la industria fronto de nia lando. 70% de la miloj da specoj de teksaĵoj estis novaj produktoj kun novaj desegnoj. 60% de la maŝinoj estis novaj specoj, inter kiuj pli ol dudek ilmaŝinoj estis sukcese provfabrikitaj dum la granda proletara kultura revolucio venis al alta tajdo de batalo por ĉiuflanka venko. Novaj sukcesoj vidiĝis ankaŭ en la produktado de precizaj instrumentoj, kemiaĵoj, medicinaj aparatoj, metalaĵoj kaj ŝtalaĵoj.

La produkta forto estis refoje multe liberigita, post kiam la laborista klaso de nia lando prenis al si la gvidantecon al produktlaboro kaj tekniko en la industriaj kaj minaj entreprenoj. En la nuna foiro Ŝanhajo liveris multe pli da novaj industriaj produktoj ol en iu ajn antaŭa foiro. La granda platfaceta ilmaŝino kun internacia progresinta nivelo sukcese provfabrikita de la fama Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko en majo 1968, estas unu el la plej novaj kontribuoj, kiujn la laborista klaso de Ŝanhajo faris al la socialisma konstruado. Same kiel tiu maŝino, troviĝis ankoraŭ multaj produktoj, kiuj estas la kristalo de la inteligento kaj saĝo de la laborista klaso. La granda, 200,000-obla elektrona mikroskopo montrita en la halo de aparatoj estas nemalhavebla altklasa preciza instrumento, kiun sciencaj institucioj uzas por esplori la mikrokosmon kaj disvolvi la modernan sciencon kaj teknikon. Tiu grava instalaĵo estas sukcese provfabrikita en kunlaboro kun veteranaj laboristoj per peniga luktado en ok monatoj de juna teknikisto de Ŝanhaja Optikteknika Esplora Instituto, kiu estis selektita el la laboristoj kaj sendita por studi en la laborista-kamparana kurso de Ŝanhaja Meĥanika Lernejo kaj diplomiĝis tie. Tiu atingo plene montris la senkomparan saĝecon de la granda instrukcio de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ **"La vojo irita de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko en trejnado de teknikaj laborantoj el la laboristoj devas esti prenata."**



*Albanaj kamaradoj vizitantaj la foiron entuziasme kantas la kanton "Marnavigo Dependas de Stiristo" kune kun ĉinaj laborantoj.*

La amikoj el komercaj rondoj diverslandaj amase laŭdis en la foiro la novajn atingojn, kiujn la laborista klaso de nia lando akiris dum la granda proletara kultura revolucio. Amiko el nordeŭropa komerca rondo diris, ke de li ĉifoje vizitita fabriko en Foŝan, Guangdong-provinco, kiu estis malgranda antaŭ la granda proletara kultura revolucio kaj okupis sin ekskluzive pri riparo, nun posedas bonkvalitajn maŝinojn, ke la laboristoj kaj oficistoj ĉiuj plenaj de vigleco estas produktantaj ekipaĵojn de agrikulturaj maŝinoj en granda kvanto. Tiu ekzemplo montras, ke la ĉina industrio rapide disvolviĝas, sed ne "stagnas" aŭ "retroiras" kiel mensogis imperiismo, reviziismo kaj reakciularoj. Amiko el okcidenta lando, kiu multfoje venis al nia lando por ĉeesti la foiron, diris, ke ĉar la nuna foiro estas pli granda ol tiu en iu ajn antaŭa jaro, li ne bezonas maltrankviliĝi pri livero de varoj, kiujn li aĉetos. La ĉinaj eksportaj varoj estas de bona kvalito kun prezo racia kaj ĝuas altan reputacion en la internacia merkato.

## GRANDA KRESKO DE AGRIKULTURAJ PRODUKTOJ

En la halo de agrikulturo estis montrataj agrikulturaj produktoj de la dudek naŭ provincoj, municipaloj kaj aŭtonomaj regionoj de nia lando en abunda kvanto. Tio plene spegulas la bonegan situacion de sinsekvaj riĉaj rikoltoj en ĉina agrikulturo kaj montras la senkomparan superecon de la sistemo de popolaj komunumoj en la ĉina kamparo kaj ankaŭ la ĉiam pli grandan prosperon de la vasta ĉina kamparo.

La grenoj, oleoj kaj manĝaĵoj montritaj en la foiro kreskis de pli ol 2,500 antaŭ la granda proletara kultura revolucio ĝis pli ol 3,000 specoj en la nuna tempo. Pligrandiĝis la proviza kvanto de tiaj varoj, kiaj manĝebla oleo, rizo, sukero, viandoj kaj enladigitaj manĝaĵoj. Nun la agrikulturaj produktoj venas ne nur de la fekundaj apudmaraj provincoj kaj ebenejoj kun pli alta produktnivelo

sed ankaŭ de la internaj altebenejoj kaj montregionoj kaj la limregionoj kun malpli alta produktnivelo en la pasinteco.

En la halo de grenproduktoj oni povas vidi bonkvalitajn rizon, tritikon, fabojn kaj kolzojn, kiuj venis de la piedo de Tianŝan-montaro. Oni povas vidi ankaŭ grandan kvanton da altvaloraj lokaj kaj specialaj produktoj, kiujn la vastaj amasoj de komunumanoj en Tibeto, Gujĝoŭ, Junnan, Guanghi kaj aliaj limregionoj liveris al la ŝtato dank' al disvolvo de ĉasado kaj ekspluato de montaj riĉfontoj. Ankaŭ la entrepreno pri teo — tradicia eksportaĵo de Ĉinio — rapide disvolviĝis. La plantareo de novaj te-regionoj en la sudaj provincoj plivastiĝis tre rapide, kaj teplantejoj en Guangdong sola plivastiĝis je 100,000 muoj en 1966.


Parolante pri siaj impresoj, multaj amikoj el eksterlandaj komercaj rondoj forte refutis per faktoj propraokule viditaj la mensogojn kaj kalumniojn fare de la propagandaj maŝinoj de la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo kontraŭ la foiro. Respondeculo de unuigita delegacio de Japani-ĉinia Amikeca Asocio (Ortodoksa) kaj Japani-ĉinia Asocio por Kultura Interŝanĝo vizitis la foiron dum sia restado en Ĉinio. Priparolante sian impreson pri Ĉinio post sia reveno al Tokio li diris: "La granda proletara kultura revolucio gvidata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ estas akiranta ĉiuflankan venkon. Tiu ĉi granda revolucio faras Ĉinion granda socialisma lando neniam ŝanĝonta sian koloron kaj plej fidinda fortikaĵo de la revoluciaj fortoj de la tuta mondo. La bonega situacio, kiu aperas sub la direktado de la penso de Maŭ Zedong, formas okulfrapan kontraston kun la ĉiam pli gravaj malfaciloj de la usona imperiismo kaj la ĉiam pli serioza bankroto de la sovetunia reviziismo."

## GRANDA INICIATO EN LA ARTA HISTORIO

En tiu ĉi foiro la Fortepiana Muziko *Ruĝa Signal-lanterno* kun Kantado de Pekina Opero — nova speco de revolucia arto de la ĉina proletaro — kaj aliaj revoluciaj modelaj teatraĵoj ankaŭ ĝuis varman akcepton de la eksterlandaj amikoj el diversaj kontinentoj de la mondo.

Kiam disvastiĝis la ĝojiga novaĵo pri prezentado de la revoluciaj modelaj teatraĵoj fare de ĉinaj revoluciaj artaj kaj literaturaj laborantoj en la foiro, la diverslandaj amikoj konkure venis por spekti. Ili sentis, ke tre signifoplena estas la afero, ke ili havas okazon rigardi en Ĉinio la revoluciajn modelajn teatraĵojn fame konatajn tra la mondo. Por rigardi plian revolucian modelan teatraĵon en Kantono iuj eksterlandaj amikoj ŝanĝis siajn vojaĝajn planojn kaj aranĝis nuligon de la jam menditaj


*Fremdlandaj gastoj atente rigardas la 200,000-oblan elektronan mikroskopon en la halo de aparatoj.*



biletoj por aviadilo aŭ trajno. Kelkaj forte deziris, ke tiuj modelaj teatraĵoj estu prezentataj en iliaj propraj landoj. Ankoraŭ multaj aliaj esperis, ke la tuto de la revoluciaj modelaj teatraĵoj estos filmita kaj prezentita al la tuta mondo. Spektinte la simfonian muzikon *Ŝagiabang* kaj la Fortepianan Muzikon *Ruĝa Signal-lanterno* kun Kantado de Pekina Opero k. a., japana amiko, kiu okupis sin pri muziko dum multaj jaroj, diris: "En mia juneco mi okupis min pri muzika agado en ĥoro, tial mi ricevis aparte profundan senton el tiuj modelaj teatraĵoj. En la pasinteco mi opiniis, ke la verkoj de la tiel nomataj okcidentaj majstroj de arto estas kulmino neatingebla; sed nun mi konstatis, ke la simfonia muziko *Ŝagiabang* estas vere kulmino de la nuntempa arto. Tiu nova speco de arto estas granda kreaĵo de la konsisto de la simfonia orkestro ĝis la formo de prezentado, multe pliriĉigis la esprimpovon de simfonio kaj estas speco de novtipa, perfekta arto. Same, mi opiniis antaŭe, ke fortepiano estas la plej altgrada muzikilo kies esprimpovo jam estas disvolvita ĝis ekstremo, sed mi ege surpriziĝis spektinte la fortepianan muzikon *Ruĝa Signal-lanterno* kun kantado. Ĝi transpaŝis la antaŭan limon kaj malfermis tute novan vojon por disvolvo de la fortepiana muziko. La revoluciaj modernaj baledoj *Ruĝa Virina Taĉmento* kaj *Blankhara Knabino* rompis la rutinon de la malnova baleda arto kiel disvolvante la trajtojn de baledo tiel ankaŭ aldonante al si popolajn dancojn, kiujn ŝatas la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj elhakis novan vojon por la proletara baleda arto."


*La sinsekvaj agrikulturaj riĉrikoltoj de nia lando liveris abundajn agrikulturajn kaj flankokupajn produktaĵojn al la foiro.*

La diverslandaj amikoj kaj la patriotaj elmigrintaj ĉinoj vidis per siaj okuloj en la prezentado de la revoluciaj modelaj teatraĵoj la emocian prosperon sur la scenejo de proletara literaturo kaj arto de Ĉinio. Ilin profunde impresis la forta potenco de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ kaj la granda sukceso de la granda proletara kultura revolucio de nia lando. Gvinea amiko diris: "Spekti la revoluciajn modelajn teatraĵojn estas bonega lerno por ni. Ĉiu el tiuj teatraĵoj elstare enkorpigas la proletaran revolucian politikan linion kaj la proletaran revolucian literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ. Ili kuraĝigos la revoluciajn popolojn de la tuta mondo unuigi sin kaj firme teni la pafilojn por ĝisfine konduki la batalon por kompleta venko."



*La propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong organizita de la familianoj de malriĉkamparano Ding Lajjoŭ de Longhua-brigado, Boluo-gubernio, Guangdong-provinco, kiun oni nomas "La Ruĝa Familio", venis al la foiro por prezentado kaj estis bonvenigata de diverslandaj gastoj. Jen la tri infanoj de la familio prezentas la kantodancon "Longan Longan Vivon al Prezidanto Maŭ!"*

*Sinjoro Mohameto, administranto de la Ŝtata Komerca Kompanio de Jemeno subskribas kontrakton kun reprezentanto de la Ĉina Komerca Korporacio de Grenoj, Oleoj kaj Manĝaĵoj, por aĉeto de granda kvanto da enladigita viando.*



# Vinberoj de Turfan

DUAN VEN



*Ujguraj junulinoj rikoltas vinberojn.*

EN la nordorienta parto de Turfan-gubernio de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono de nia lando, troviĝas popola komunumo nomata Putaŭ. Ĝi konsistas el kvin produktaj brigadoj, nome: Putaŭ (*Vinbero*), Tongji (*Unueco*), Lejuan (*Edeno*), Hingfu (*Feliĉo*) kaj Huajuan (*Ĝardeno*), kiuj estas famaj pro sia produktado de vinberoj.

La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj tie havas tre longan tradicion de kulturado de vinberoj, el kiuj la plej bona speco estas la blanka senkerna vinbero. Aŭgusto kaj septembro estas la plej okupata tempo por rikolto kaj sekigo de vinberoj. Tiam flirtas ĉie ruĝaj flagoj en la vitejoj, kiuj dense kovras la valojn kaj kampojn; ruĝaj tabuloj kun vortoj de Prezidanto Maŭ staras ĉe verdaj vitoj rampantaj sur apogiloj. Prikantante per kantoj nian grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, la komunumanoj kolektas grapolon post grapolo da vinberoj. Sub la vitapogiloj kovritaj per densaj branĉoj kaj folioj, la komunumaninoj plenigas korbojn post korboj per vinberoj de diversaj specoj: la ronda "senkerna-blanka", la kokonforma "ĉevalmamo", la purpura ruĝvinbero, la verda "kaŝkar", la purpura vinbero kaj droga "Soso"-vinbero. La plenigitaj korboj estas sendataj al la sekigejoj.

De malproksime videblaj estas sekigejoj, kiuj grandioze staras unu apud alia en liberaeraj lokoj ĉe montpiedo aŭ montdeklivo. Tiuj sekigejoj estas konstruitaj el adoboj, sur kies muroj estas multaj malgrandaj truoj por ventoli. En ties sekigaj ĉambroj laŭvice staras lignaj bastonoj kun pikaĵoj, sur kiuj pendas grapoloj post grapoloj da blankaj senkernaj vinberoj. Post ĉ. 40 tagoj, tiuj vinberoj nature sekiĝas. La sekvinberoj el tiaj sekigejoj estas freŝaj en koloro kaj bonaj en kvalito, tial tre rapide disvendiĝas kaj trovas bonan akcepton en- kaj ekster-lande.

Antaŭ la Liberiĝo, tie oni ne kulturis grenojn, kaj la plejparto de pli ol 2,000 muoj da vitĝardenoj kaj de subteraj kanaloj estis en la manoj de bienuloj kaj akvo-tiranoj. La diversnaciaj popolanoj tie loĝantaj vivis en mizero. Post la Liberiĝo de Hingiang en 1949, Prezidanto Maŭ portis al ili ĝojon kaj feliĉon. Dum la 19 jaroj, alte tenante la brilajn standardojn de la ĝenerala linio, granda antaŭensalto kaj popola komunumo, sinapogante sur la propraj fortoj por strebi al prospero, la diversnaciaj popolanoj gajnis al si la nunan prosperan scenon de la Putaŭ-a Popola Komunumo per plej peniga batalo. Ĝis 1968, la kulturata tero de la komunumo jam disvastiĝis ĝis pli ol 30,000 muoj,

inter kiuj la vitkulturejo okupis pli ol 7,000 muojn. Ĉiujare krom tiuj por memprovizo, ĝi ankaŭ havas superfluajn grenojn por subteni la socialisman konstruadon. Ĝi vendis al la ŝtato 3,050,000 kg. da grenoj sole en la jaro 1967. Apogante sin sur la kolektivaj fortoj, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj plivastigis la plantareon de vitoj kaj plibonigis specojn de vinberoj. La pomua produktkvanto de la blanka senkerna vinbero kultivita de iuj grupoj de scienca eksperimento estis 4,500 kg., t.e. je 100% pli granda ol tiu de la ordinara samspeca vinbero.

Pli belaj perspektivoj sin sternas antaŭ la Putaŭ-a Popola Komunumo, kiu situas ĉe la vasta Gobi-dezerto.

*Ujgura maljunulo kontrolas la vinberojn sekigatajn.*



## KURANTAJ AFEROJ

### SUKCESA PROVFABRIKO DE "VAGONO KUN FALDEBLAJ LITOJ POR LABORISTOJ, KAMPARANOJ KAJ SOLDATOJ" EN KINGDAŬ

La laboristoj, revoluciaj teknikistoj kaj kadroj de la Kingdaŭ-a Sifang-fabriko de Lokomotivoj kaj Vagonoj kombiniĝis kaj sukcese fabrikis "vagonon kun faldeblaj litoj por laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj". Tio ĉi estas grava objekto en la revoluciigo de provfabriko de pasaĝeraj vagonoj. Simile al ordinara pasaĝera vagono, ankaŭ tia vagono entenas 120 sidlokojn, sed en ĝi ĉiuj pasaĝeroj povas kuŝi en nokto. Nokte, la trifaldaj tabletoj povas transformiĝi en litojn; tage, la superaj bretlitoj povas esti falditaj kaj metitaj sub la pakaĵbretojn; kaj ankaŭ la sidiloj povas servi kiel litoj.

Tia vagono ricevis laŭdon de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj dum sia longdistanca provveturado kaj pliboniĝado. Iu maljuna laboristo diris: "Nur en la granda epoko de Maŭ Zedong ni povas veturi per vagono tiom komforta."

Nun tiaj vagonoj estas liveritaj al la Ŝanhaja Fervoja Buroo kaj servas al la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

### RAPIDE DISVOLVIĜAS LA INDUSTRIO DE AGRIKULTURA MEĤANIKO DE ŜANDONG

La industrio de agrikultura meĥaniko de Ŝandong-provinco rapide disvolviĝis. La produktivo de la fabrikoj de agrikultura meĥaniko en la provinco konstruitaj en la lastaj pli ol du jaroj duoble plialtiĝis kompare kun tiu totala en la pasintaj 17 jaroj antaŭ 1966.

En la konstruado de la industrio de agrikultura meĥaniko, serioze plenumante la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ, strebante al prosperiĝo kaj sinapogante sur la propraj fortoj, la vastaj amasoj de revoluciaj oficistoj kaj laboristoj energie kondukas amasan movadon. En la lastaj du jaroj, en la tuta provinco ili mem fabrikis pli ol 1,000 instalaĵojn, konstruis aŭ transkonstruis 11 fabrikojn de agrikultura movforta meĥaniko kaj pli ol 20 fabrikojn de maŝinpartoj. Nun plejparto de la regionoj de la provinco posedas agrikulturajn movfortajn meĥanikojn.

# Ni Estas Atestantoj de la Historio

— Akuzo de maljunaj laboristoj pri la krimo de Liu Ŝaŭki perfidi la revolucion en 1927

*La Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina popolo komplete balais la grandan renegaton, internan spionon kaj laborist-perfidulon Liu Ŝaŭki en la historian rubejon.*

*Nun en nia lando, centoj da milionoj da revoluciaj popolanoj profunde faras ĝisfundan malkovron, kompletan likvidon kaj amasan kritikon al la damnindaj krimoj faritaj de Liu Ŝaŭki por plene forigi liajn kontraŭrevoluciajn reviziismajn pensojn.*

*Jen la artikolo skribita de 9 veteranaj laboristoj el Vuhan (t. e. Vuĉang, Hankoŭ kaj Hanjang antaŭ la Liberiĝo), nome Van Nengŝan, Vu Dongŝan, Ĝong Ĉenghoŭ k. a. Ili ĉiuj estis siatempe membroj de laborista pikedo kaj persone partoprenis la heroan batalon en 1927 por repreno de la kvartalo koncesiita al Britio.*

**— La Red.**

Tiel frue kiel en la jaro 1927, Liu Ŝaŭki jam estis perfidulo de la laborista klaso kaj krimplena lakeo lojala al imperiismo, reviziismo kaj la kuomintanga reakciularo. Ni estas atestantoj pri la historio de tiu periodo. Nun ni malkovras kaj akuzas lian damnindan krimon sange subpremi la revolucian movadon de la Hankoŭ-aj laboristoj en komploto kun imperiismo, la kuomintanga reakciularo kaj la malnova dekstrema oportunisto Ĉen Duhiu.

Dum la jaroj de la Unua Granda Revolucio, ni ĉiuj laboris kiel kulioj de britaj kaj francaj imperiistoj kaj faris laborojn por burokrataj kapitalistoj, suferante ĉian subpremon kaj ekspluaton. Dank' al la gvido de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ni laborista klaso decidis organiziĝi unuece por renversi la tri grandajn montojn, kiuj pezis sur niaj kapoj.

En la jaro 1926, vigle leviĝis la revolucia movado de laboristaj kaj kamparanaj amasoj tra la tuta lando. Prezidanto Maŭ montris en sia brila verko *Analizo de la Klasoj en la Ĉina Socio:* **"La industria proletaro estas la gvida forto de nia revolucio."** Poste, en sia alia brila dokumento *Raporto pri Esplorado de la Kamparana Movado en Hunan*, skribita en la Centra Instituto de Kamparana Movado, kiun Prezidanto Maŭ fondis en Vuĉang, li plie montris: **"Revolucio estas ribelo, perforta agado fare de unu klaso por renversi alian."** kaj alvokis la kamparanojn leviĝi por **"renversi la armitajn fortojn de la bienuloj kaj starigi la armitajn fortojn de la kamparanoj"**. La subteno de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ al nia leviĝo por revolucii kaj ribeli multe nin kuraĝigis. Lia instrukcio eldiris tion kio estis en nia koro kaj efike direktis la tiam ardantan revolucian movadon de laboristoj kaj kamparanoj.

Sekve do tempeste leviĝis la laborista revolucia movado en la regiono de Vuhan de Hubej. Ni ĉiuj aliĝis al la fervojista sindikato kaj fariĝis laboristaj pikedanoj. La nombro de sindikatanoj kreskis tuj ĝis 300,000. Ankaŭ infanoj havis sian organizon de laboraj skoltoj. Estis lanĉita grandskala ofensivo kontraŭ imperiismo, feŭdismo

*Kiam la iama laborista pikedano, ordone malarmita de Liu Ŝaŭki dum la Granda Revolucio, vizitas la Lernejon de Kamparana Movado fondita de Prezidanto Maŭ, li varme laŭdas la brilan penson de Prezidanto Maŭ pri armita batalado kaj indigne akuzas la damnindajn krimojn de renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki pri perfido de la revolucio kaj laborista movado.*



kaj burokrata kapitalismo, kaj en la fino de 1926 eksplodis ĝenerala striko, kiu skuis la tutan landon. La 3-an de januaro 1927, marsoldatoj de la brita imperiismo tirane pafmortigis niajn samlandajn fratojn kaj tiel fabrikis la "Sangan Incidenton de la 3-a de Januaro". La laborista klaso de Vuhan plene indignis kaj ni fervojistaj pikedanoj la unuaj ekprenis bastonojn kaj ŝtonojn kaj kondukis la revoluciajn amasojn sturmi al la kvartalo koncesiita al Britio, laŭte kriante la revoluciajn sloganojn kiaj "For la britan imperiismon!" "Repreni la kvartalon koncesiitan al Britio!" La britaj policanoj ĉiurimede nin baris, kaj ĉe la enirejoj de la koncesiita kvartalo estis starigitaj multaj fortikaĵoj kun mitraloj kontraŭ ni. Sed, ne timante morton ni persiste provis puŝi nin en la koncesiitan kvartalon kaj fine sukcesis entrudiĝi. Ni forpelis la britajn policanojn, reprenis la kvartalon, grave debatis la arogantecon de imperiismo kaj multe altigis la batalvolon de la proletaro. La laborista pikedo skuis la tutan urbon per sia potenco, kaj la vastaj revoluciaj amasoj senescepte aplaŭdegis vidinte la scenon kaj sentis fieran kontentecon. La brita imperiismo teruriĝis kaj konsterniĝis antaŭ la revolucia agado de la laborista pikedo. Ankaŭ la dekstra alo de Kuomintango kun la popola malamiko kaj diktatoro Ĉiang Kajŝek kiel reprezentanto ĝisoste malamegis tiun ĉi revolucian agon kaj arogante kriis ke "tio kaŭzos gravajn sekvojn", kaj ke "oni devas absolute eviti perfortajn agojn", celante per tio strangoli la vigle leviĝantan laboristan movadon. En la Komunista Partio, servante kiel komplicoj de imperiismo kaj Ĉiang Kajŝek, la malnovaj dekstremaj oportunistoj, Ĉen Duhiu kaj Liu Ŝaŭki insultis la laboristan movadon de Hankoŭ. Liu Ŝaŭki, tiu granda laborist-perfidulo, senkaŝe ordonis la laboristan pikedon plene retiriĝi el la koncesiita kvartalo. En la 7-a de januaro, kun larmoj 300 laboristaj pikedanoj retiriĝis el la kvartalo. Kaj tiamaniere, al la kuomintanga reakciularo la frukto de venko akirita de ni per sango kaj vivo estis donacita riverence de la granda renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki. Tio plene pruvis, ke Liu Ŝaŭki jam delonge estis malnova kontraŭrevoluciulo staranta sur la flanko de imperiismo kaj

la kuomintanga reakciularo kaj estis la "Ĉiang Kajŝek" enŝteliĝinta en nian partion.

Sed sekvis ankoraŭ pli indignigaj aferoj poste.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruis al ni: **"El la pafilo venas ŝtatpotenco."** El la propra longdaŭra dolora suferado de subpremado kaj ekspluatado, ni profunde komprenis, ke la kaŭzo, pro kio ni estas subpremataj kaj ekspluatataj de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, kuŝas en tio, ke la laborista klaso ne posedas la regpotencon, kaj por kapti ĝin oni devas apogi sin sur pafiloj. Kiam Prezidanto Maŭ fondis la Centran Instituton de Kamparana Movado en Vuĉang printempe de 1927, li jam donis grandan atenton al milita trejnado. Kaj sekvante la instrukcion de Prezidanto Maŭ ni laborista pikedo ekprenis pafilojn por fari militan trejnadon. Tiutempe la laborista pikedo kun pli ol 5,000 membroj havigis al si pli ol 3,000 pafilojn, kaj krome estis pli ol dek mil laboraj skoltoj kun lignaj bastonoj en la manoj. Sed, post la revolucia ago de repreno de la kvartalo koncesiita al Britio, imperiismo kaj la kuomintanga reakciularo morte malamis kaj timis tiun armitan forton de la laboristoj kaj provis ĝin ekstermi. Kaj ĝuste en tiu ŝlosila momento de decida batalo inter la revolucio kaj la kontraŭrevolucio, rilate al la esenca, principa demando — kiu disponu la pafilojn, Liu Ŝaŭki sin ĵetis en la sinon de imperiismo kaj la kuomintanga reakciularo, plene malkovrante sian renegatan fizionomion. Tiam li ne nur mem elpaŝis por instigi la laboristajn pikedanojn elliveri siajn pafilojn, sed ankaŭ por tio publikigis sinsekve "cirkulerajn telegramojn" *Al la Laboristoj*, *Al Kamaradoj Soldatoj* k. a. per la nomo de la "Hubeja Tutprovinca Laborista Sindikato". Li cetere absurde diris, ke la laboristaj pikedoj "malfavore influis la unuecan fronton de la laboristoj kaj soldatoj" kaj ke la malarmado de la laboristaj pikedoj "celas protekti la interesojn de la revolucio" kaj estas "tute ne mirinda". Eĉ pli senhonte estis, ke li petis "protekton de la registaro" de la reakcia Kuomintango. La 28-an de junio 1927, kiam ni aŭdis la ordonon de Liu Ŝaŭki pri kompleta disigo de la laborista pikedo kaj ellivero de ĉiuj armiloj kaj municio, ĉiuj eksplodis de kolero. Ni profunde komprenis la gravecon de pafiloj kaj ke post ellivero de la pafiloj de la laborista pikedo, imperiismo denove tiranos super ni, la kuomintanga reakciularo pli arogantos, kaj ni laboristoj estos de ili kruele subpremataj kaj tretataj. Efektive, nelonge post la ellivero de la pafiloj de la laborista pikedo, la kuomintanga reakciularo komencis sangan masakron en Vuhan. Sub ilia kontraŭrevolucia politiko "prefere mismortigi mil ol preterlasi unu", sennombraj komunistoj kaj laboristaj pikedanoj estis kruele mortigitaj. La ardanta revolucia movado de laboristoj estis tiel entombigita de Ĉen Duhiu, Liu Ŝaŭki kaj iliaj kunuloj. La sango, kiun verŝis la martiroj, plene pruvas, ke Liu Ŝaŭki estas morta malamiko de ni laborista klaso, estas lojala lakeo de imperiismo kaj la kuomintanga reakciularo, kaj estas renegato de la revolucia laborista movado.

La aserto de Liu Ŝaŭki ke la malarmado de la laboristaj pikedoj "celas protekti la interesojn de la revolucio" estas trompo de la kapo ĝis la piedoj. Pafiloj estas la vivradiko de la laboranta popolo. Kiam la vivradiko estas elliverita, kiajn aliajn "interesojn de la revolucio" oni povas ankoraŭ protekti? La fakto ke Ĉiang Kajŝek kaj Vang Gingvej, la komunaj malamikoj de la popolo, mortigis laboristajn pikedanojn per la elliveritaj pafiloj, elokvente montris, ke Liu Ŝaŭki tute ne "protektis la interesojn de la revolucio", sed male, protektis ĝuste la interesojn de la kontraŭrevolucio, prezentante la vivradikon de la laboranta popolo komplezeme al la kuomintanga reakciularo. Niaj okuloj sparkis pro kolero kaj indigno, kiam ni devis elliveri niajn pafilojn, sed la laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki nomis tion nenecesa "miro" kaj volis ke ankaŭ ni obeeme leku la manon de la kuomintanga reakciularo same kiel li hundaĉo. Tio estas simple sonĝado en tago! Ni laborista klaso ĉiam havas malmolajn ostojn antaŭ malamiko kaj kuraĝas subtreti imperiismon, la kuomintangan reakciularon kaj ilian hundaĉon Liu Ŝaŭki sur la teron. Al la diabloj ili ĉiuj!

Tiu historia fakto ke Liu Ŝaŭki perfidis la revolucion en Vuhan en 1927, kvazaŭ akra glavo deŝiris senkompate la mantelon de Liu Ŝaŭki, per kiu li de longa tempo ŝajnigis sin "veterana revoluciulo", "marksist-leninisto" kaj "gvidanto de laborista movado", kaj malkovris lian kontraŭrevolucian fizionomion de malnova kontraŭrevoluciulo, malnova dekstrema oportunisto, granda renegato, granda interna spiono kaj granda laborist-perfidulo, kiu elvendis la laboristan movadon.

La Partio kaj revoluciaj amasoj por ĉiam eksigis el la Partio tiun krimplenan kaj ĉiam reakcian reviziiston kaj ĵetis lin en la historian rubejon. Tio estas venko de la granda proletara kultura revolucio, venko de la laborista klaso kaj la tutlanda revolucia popolo, kaj venko de la penso de Maŭ Zedong!

ŜEN GUJJING:

# Vizaĝo de Lakeo

LA Plivastigita Dekdua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio por ĉiam eksigis el la Partio la grandan renegaton, grandan internan spionon kaj grandan laborist-perfidulon Liu Ŝaŭki, senigis lin je ĉiuj oficoj en- kaj ekster-partiaj, kaj per tio deklaris lian kompletan bankroton. Tio estas afero ĝojiga al ĉiuj kaj spegulas la komunan deziron de la laborista klaso kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj amasoj de la tuta Ĉinio.

Prezidanto Maŭ instruas nin: **"En la mondo tute ne ekzistas senkaŭza amo nek senkaŭza malamo."** Akran kontraston mi vidis inter la malamo, kiun montris Liu Ŝaŭki al la laboristoj, kaj la amo, kiun li montris al la kapitalistoj dum sia "inspekto" al nia fabriko en 1956.

En la vintro de 1956, ĝuste kiam nia lando estis kondukanta socialisman transformon de la kapitalismaj industriaj kaj komercaj entreprenoj, kaj ankaŭ en la ŝlosila momento, kiam la proleta-

*Laboristinoj de la Kvara Kotonŝpina Fabriko de Vuhan okazigas ĉelokan kritikan kunvenon por forte kritiki la kontraŭrevoluciajn krimojn de renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki.*



ro estis faranta vivmortan batalon kontraŭ la burĝaro, la granda laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki venis al nia fabriko kun sia edzino por fari tiel nomatan "inspekton" en daŭro de tri horoj. Kiel reprezentanto de la laboristoj de la tuta fabriko mi iris viziti tiun "grandan personon". Li sidis sur seĝo kun gamboj unu sur la alia, kvazaŭ juĝisto flegme faris al mi iajn demandojn. Antaŭ ol mi trovis tempon por respondi, li jam turnis sin al alia temo kaj urĝeme volis intervidiĝi kun la kapitalistoj, ordonante venigi la plej grandan kapitaliston de la fabriko. Apenaŭ la kapitalisto enpaŝis la ĉambron, la renegato Liu Ŝaŭki tuj iris renkonte al li kun vizaĝo plena de rideto, kvazaŭ vidante sian parencon. Li kaj riverencis kaj manpremis, prezentis kaj teon kaj cigaredon kaj sidigis la kapitaliston tuj apud si sur la sama sofo ŝultron ĉe ŝultro. De la pasinteco ĝis la nuno, de la kapitalisto mem ĝis ties tuta familio, li detale pridemandis la kapitaliston. Kiam la kapitalisto diris, ke ĉiumonate li povas ricevi salajron de pli ol 130 juanoj kaj fiksitan interezon en sumo de pli ol 10,000 juanoj po-jare, la laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kun granda zorgo foje kaj refoje demandis: "Eble ne sufiĉas, ĉu ne?" Jen vidu! Kiom da intimo kaj zorgo Liu Ŝaŭki montris al la kapitalisto! Sed al ni laboristoj tiu granda renegato montris sin tiom flegma kaj kruela. Aŭdinte ke venis la "granda persono", multaj laboristoj de nia fabriko pro sia varma amo al la Partio kaj al Prezidanto Maŭ tre deziris vidi tiun ĉi "gvidanton" el la Centra Komitato de la Partio. Tamen, li traktis nin laboristojn en sinjora sinteno, kaj firme fermis la pordon de la ĉambro, en kiu li troviĝis. Kiam li jam babilaĉis sate kun la kapitalisto, li malalten tiris sian ĉaprandon, levis la kolumon de la surtuto, surmetis la buŝkovrilon, haste enaŭtiĝis kaj forglitis el la fabriko.

*Laboristinoj de la laborejo de viskoza kotono antaŭenpuŝas la produkton per la revolucio kaj senĉese renovigas sian produktan rekordon. Konsiderante, ke prizorgo de unu plia ŝpindelo signifas pafon de unu plia obuso kontraŭ Liu Ŝaŭki, ili multe altigis la kvoton de prizorgataj ŝpindeloj.*



Ĉu ne tute evidentiĝis, al kiu klaso la granda renegato Liu Ŝaŭki apartenas, el liaj malsamaj sintenoj montritaj al la laboristoj kaj al la kapitalistoj dum la tri horoj? Kiam ni rememoras la "inspekton" de Liu Ŝaŭki en 1956, ni laboristoj de la tuta fabriko sentas senkomparan indignon. Tiu afero, precipe la granda nombro da faktoj malkovritaj de centmiliona revolucia amaso de la tuta lando, pruvas, ke la granda renegato Liu Ŝaŭki ligiĝas kun la kapitalistoj, imperiismo, reviziismo kaj kuomintanga reakciularo koron kun koro kaj spiras kun ili per sama nazo, kaj ke li estas de la kapo ĝis la piedoj lakeo de imperiismo, reviziismo kaj reakciularo.

---

*Noto: La verkinto de tiu ĉi artikolo estas veterana laboristo de la Kvara Ŝpina Fabriko de Vuhan.*

*La nomita fabriko estis antaŭe Juhua-Ŝpinejo antaŭ la Liberiĝo. La "inspekto", kiun faris Liu Ŝaŭki al la fabriko en 1956, fakte estis privata vizito al la kapitalisto de tiu ŝpinejo kaj perfido al la laborista klaso.*

# *Al Diabloj la Tezo de Liu Ŝaŭki*

# *"Aliĝi al Kompartio por Fariĝi Estro"!*

LA granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong instruis al ni: **"Ni komunistoj ne celas fariĝi estroj, sed fari revolucion."** Lia granda instruo montras la revolucian kvaliton, kiun komunistoj nepre devas posedi, kaj la bazan karakteron, kiu distingas la partion de la proletaro disde tiu de la burĝaro.

Sed Liu Ŝaŭki, la ĝenerala reprezentanto de la burĝaro enŝteliĝinta en la Partion, konstante predikis la ĝismedole reakcian tezon "aliĝi al kompartio por fariĝi estro", absurde dirante: "En la pasinteco oni povis fariĝi estroj post sukceso en ŝtata ekzameno, nun oni ankaŭ povas fariĝi estroj post aliĝo al la Komunista Partio, kaj la nomaro de kompartianoj ja estas listo de kandidatoj por kadroj." Tio plene malkovris lian abomenindan animon de ekspluata klaso.

En la feŭda socio ĉiuj aspirantoj al oficista titolo de ŝtataj ekzamenoj ambiciis per sia tuta koro fariĝi estro. Estante estroj ili povis pli kruele ekspluati kaj subpremi la popolon kaj tirane rajdi sur ĝia nuko. Kaj la reakcia reganta klaso ja selektis al si kontentigajn lakeojn kaj ĉenhundojn kiel instrumentojn por defendi sian reakcian regadon ankaŭ pere de ŝtataj ekzamenoj. Estas ja reakcio de la kapo ĝis la piedoj, ke Liu Ŝaŭki identigis la aliĝon al la Komunista Partio kun partopreno en ŝtataj ekzamenoj en la feŭda tempo!

Kompartianoj devas esti progresintaj elementoj de la proletaro kaj servantoj de la popolo. La karaktero de nia partio kiel avangardo de la proletaro decidas ke ĉiu ties membro havas nur la devon servi al la popolo, sed absolute ne la rajton ĉasi la personajn interesojn. Nia aliĝo al la Partio tute ne celas fariĝi estro, sed gvidi la amasojn por batali kontraŭ la klasaj malamikoj kaj realigi komunismon en la homa socio. Tia nobla celo de kompartianoj havas nenion komunan kun tiu de la partoprenantoj de ŝtataj ekzamenoj en la feŭda socio. Liu Ŝaŭki egaligis la aliĝon al la Komunista Partio kun la partopreno de ŝtataj ekzamenoj kaj fariĝo de estroj en la feŭda tempo,

*Brutbredistoj de Deŝeng-brigado de Ĝengiaŭ-komunumo, Dongfeng-gubernio de Gilin-provinco kritikas la damnindajn krimojn de renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki.*






*Vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Ginghi-a Mina Administracio forte kritikas la venenan influon de la kontraŭrevoluciaj reviziismaj "ses tezoj" de Liu Ŝaŭki.*

tio estas senhonta distordo al la karaktero de nia partio kaj la plej granda kalumnio al la vastaj amasoj de niaj partianoj.

Kamarado Maŭ Zedong diris: **"Komunistoj devas neniam kaj nenie meti la personajn interesojn sur la unuan lokon, sed devas subordigi ilin sub la interesoj de la nacio kaj de la popolamasoj."** Partianiĝi por la revolucio aŭ por fariĝi estro estas kriterio por distingi veran kompartianon disde la falsa. La kerno de la mondkoncepto de la proletaro estas la "kolektivo". Ĉiuj veraj kompartianoj devas havi la komunisman spiriton dediĉi la tutan koron al kaj fari ĉion por la kolektivo, doni sian zorgon kaj koncentri siajn fortojn al la kolektivo kaj lukti kune kun la vastaj revoluciaj popolamasoj por krei ruĝan novan mondon de kolektivo. La kerno de la mondkoncepto de la burĝaro estas la "individuo", alivorte: "kiu ne agas por si, tiun ekstermos eĉ la ĉielo kaj tero" kaj dediĉi la tutan koron al kaj fari ĉion por la individuo. La de Liu Ŝaŭki distrumpetita tezo "aliĝi al kompartio por fariĝi estro" instigas, ke oni prenu aliĝon al la Partio kiel ŝtuparon por iri al altaj pozicioj kaj sin riĉigi, ke oni prenu la honoron de partiano kiel kapitalon por ĉasi famon kaj profiton, kaj ke oni ne domaĝu eĉ perfidi la interesojn de la Partio kaj de la popolo kaj fariĝi hontindaj renegatoj por estriĝi. Liu Ŝaŭki, tiu renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo, mem estas tia viva ekzemplo. Ĝuste estas li, kiu por fariĝi "estro" plurfoje genufleksis antaŭ la malamiko petante indulgon. Ĝuste estas li, kiu kun la sama celo eĉ pledis por ellivero de la armiloj de la popolo al Ĉiang Kajŝek, la komuna malamiko de la popolo post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Sed la historio estas senkompata, kaj tiu malnova kontraŭrevoluciulo fine estas submetita al la juĝado de la Partio kaj popolo en la granda proletara kultura revolucio.

Prezidanto Maŭ instruis al ni: **"Komunistoj absolute ne devas apartiĝi de la amasoj kaj alte stari super ili, tenante sin mandarene kaj grandsinjore, sed devas aperi antaŭ, profundiĝi inter kaj kombiniĝi kun la amasoj tenante sin kiel ordinaraj laboruloj."** Ĉiuj veraj kompartianoj, kiel ajn altaj estas ties pozicioj, devas intime ligiĝi kun la amasoj, atente aŭskulti iliajn voĉojn, akcepti ilian kontroladon, trakti ilin kun sinteno de egalulo, kaj modeste lerni de ili kiel malgrandaj lernantoj. Nur tiamaniere, nia partio povas ĉiam trovi subtenon ĉe la amasoj kaj ĉerpi senfinajn fortojn el ili, kaj niaj partianoj povas ĉiam konservi sian revolucian viglecon kaj

konstante marŝi antaŭen. En tiu ĉi numero ni raportas pri la agoj de la kompartianoj Ĉen Jongguj, Huang Hianghe, Guo Deĵun kaj multaj aliaj el Kadra Lernejo "La 7-a de Majo". Ili ĉiuj estas tiaj, kiuj agas kiel ordinaraj laboruloj laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ. Tre klare estas ke la tezo "aliĝi al kompartio por fariĝi estro" distrumpetita de la granda renegato Liu Ŝaŭki estas muro, kiu disigas la kompartianojn disde la amasoj. "Fariĝi estro", "ĝui privilegion" kaj "stari je unu grado pli alte ol ordinaruloj" metante sin super la amasoj tuj post aliĝo al la Partio estas aĉa stilo de la burĝaro. Kompartianoj, kiuj estas infektitaj de tia stilo, degeneros kaj perdos la revolucian karakteron de la proletaro.

Senbride distrumpetante la tezon "aliĝi al kompartio por fariĝi estro", Liu Ŝaŭki krime celas uzi la "estron" kiel logilon por tiri kompartianojn sur sian kontraŭrevolucian piratan ŝipon laŭ la vojo de individuismo, por ke ili servu al lia intrigo de restaŭro de kapitalismo. Tio estas pure lumtaga sonĝo kaj mania fantazio. Ni kompartianoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong scias sole labori tutkore por la revolucio kaj prenas la "estron" kiel ion tute abomenindan. Nia plej granda deziro estas nenio alia ol senlima fideleco al Prezidanto Maŭ, al lia penso kaj al lia proletara revolucia linio, **"ekskluziva"** kaj **"senrezerva"** servo al la popolo dum la tuta vivo. Ĝang Side, Liu Hulan, Lej Feng, Vang Gie, Oŭjang Haj, Li Venĝong, Men He kaj multaj aliaj elstaraj kompartianoj estas brilaj modeloj por ni.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong montris ankaŭ en la granda proletara kultura revolucio de nia lando: **"La partia organizo devas konsisti el la progresemaj elementoj de la proletaro, ĝi devas esti vivecplena kaj viglecplena avangarda organizo, kiu kapablas gvidi la proletaron kaj revoluciajn amasojn en batalo kontraŭ la klasaj malamikoj."** La brila instrukcio de Prezidanto Maŭ estas la granda programo por la reordigo kaj konstruado de nia partio. Ni ĉiuj membroj de la Komunista Partio de Ĉinio postulas de ni mem laŭ la kriterio de avangardaj batalantoj de la proletaro kaj servantoj de la popolo.

Nun en nia lando kompartianoj kaj revoluciaj kadroj amase iris kaj iras suben por partopreni fizikan laboron kaj per sia praktika agado donis plaŭdan vangfrapon al la tezo "aliĝi al kompartio por fariĝi estro" distrumpetita de la granda renegato Liu Ŝaŭki.

## KURANTAJ AFEROJ

### FRUKTIS EN GUANGHI LA OLEOLIVAJ ARBOJ EL ALBANIO

Sub la zorgema kulturo kaj flego, la 1,500 oleolivaj arboj alportitaj el frata Albanio prospere floris kaj fruktis en 1968 en la Ŝtata Sanmengiang-a Forstkultivejo. Jam estis rikoltitaj ĉirkaŭ 1,000 ĝinoj da fruktoj. Tio estas alia ĝojiga kristalo de amikeco inter Ĉinio kaj Albanio.

Tiuj arboj de amikeco estis transplantitaj en februaro de 1964. Ili estas valora donaco de kamarado Shehu, la prezidanto de la Ministra Konsilantaro de Albanio, al nia ĉefministro Ĝoŭ Enlaj.

Post la sukcesa transplanto de oleolivaj arboj en la forstkultivejo, ankaŭ iuj gubernioj kaj popolaj komunumoj en ĝia ĉirkaŭaĵo komencis aktive kulturi tiajn arbojn. Por pli bone disvolvi kaj plivastigi tiun altproduktan kaj bonkvalitan lignecan oledonan plantaĵon, la kultivejo jam multe grandigis la fonton de arbidoj per semado, branĉoplantado, greftado kaj aliaj metodoj.

### KURACA TAĈMENTO DE LIMGARNIZONA TRUPO SERVAS AL LA TIBETAJ POPOLANOJ

Prenante la penson de Maŭ Zedong kiel gvidilon, iu kuraca taĉmento sendita de limgarnizona trupo de la Popola Liberiga Armeo en Tibeto kulturis por tibetaj kamparanoj kaj paŝtistoj nombron da sanitaristoj kun ruĝa penso kaj bona stilo kiuj ne forlasas produktan laboron kaj estas varme bonvenigataj de tibetaj popolanoj.

Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ **"tutkore kaj tutanime servi al la popolo"**, la taĉmento ofte profundiĝas en ĉirkaŭajn agrikulturajn kaj paŝtajn regionojn por kuraci kaj preventi malsanojn por tibetaj fratoj. En la rondira kuracado, post veno al la agrikulturaj kaj paŝtaj regionoj, la membroj de la taĉmento vidis, ke tie la popolanoj loĝas tre dise kaj kiam ili malsanas, ili devas iri tre longan distancon por viziti kuracistojn. Tial la taĉmento decidis aranĝi mallongan kurson por kulturi nombron da sanitaristoj samtempe sin okupantaj per produktado.

La kursanoj ĉiuj estas gefiloj de kamparanoj kaj paŝtistoj tre malriĉaj antaŭ la Liberiĝo. Lernante, ili ankaŭ partoprenis produkton. Post trimonata lernado ili jam povas kuraci ordinarajn malsanojn.




# La Tri Ĉefaj Reguloj de Disciplino kaj la Ok Punktoj de Atentigo

POST la Aŭtunrikolta Ribelo en 1927, Prezidanto Maŭ gvidis la trupon marŝi al Ginggang-montaro.

Ĝuste en tiu tempo, krom gvidi la reorganizadon de la trupo en Sanvan, starigi partiajn organizojn kaj emfazi la absolutan gvidon de la Partio super la armeo, Prezidanto Maŭ ankaŭ elmetis gravan politikan taskon, t.e., ke la trupo devas funkcii kiel armita propaganda trupo por propagandi al la amasoj ke la Ruĝa Armeo estas revolucia trupo, kiu reprezentas la interesojn de la amasoj de laboristoj kaj kamparanoj kaj batalas kontraŭ la regantaj klasoj, kaj estas revolucia trupo de la laboristoj kaj kamparanoj, kiu tute diferencas de la malnovtipa trupo. Ĉiutage Prezidanto Maŭ parolis al la trupo postulante, ke ili parolu afable, aĉetu kaj vendu juste, nek batu nek insultu...

La trupo marŝis suden al Ginggang-montaro laŭ la limo inter Hunan- kaj Gianghi-provincoj. Iun matenon, la trupo kolektiĝis apud iu vilaĝo. La vetero estis tre bona, kaj eksterordinare majestaj kaj belaj montriĝis la montoj sur la fono de aŭroro, kiuj leviĝis unuj super aliaj kun densaj arbaroj kaj bambuaroj. Tie estis la rando de Ginggang-montaro, kaj en tiu tago la trupo tuj estis ĝin enironta. Prezidanto Maŭ iris antaŭ la trupo, staris sur roko apud la vojo, kaj komencis paroladon. Antaŭ ĉio li konigis al la trupo la staton de Ginggang-montaro kaj poste diris, ke la trupo tuj suriros ĝin kaj tie starigos bazlokon, kaj ke ĉiuj nepre starigu bonajn rilatojn kun la amasoj sur la montaro kaj faru bone amasajn laborojn. Sen subteno de la amasoj, la bazloko ne povos esti fondita. Prezidanto Maŭ proklamis tri regulojn de disciplino: Unue, obeu ordonojn en ĉiuj agoj; due, donu al la kolektivo la kolektitajn monrimedojn; trie, ne prenu de la popolanoj eĉ unu bataton. Prezidanto Maŭ faris ankaŭ detalan klarigon, kial estis difinitaj tiuj tri reguloj de disciplino.

En 1928 la Ruĝa Armeo sur Ginggang-montaro marŝis en la urbon Sujĉuan kaj pasigis tie la Printempan Feston. En tiu periodo, krom ellaboro de urbaj politikoj Prezidanto Maŭ ankaŭ iris konstante inter la amasojn por fari enketon kaj esploron. Kelkajn tagojn poste, Prezidanto Maŭ kunvokis la trupon en Sujĉuan kaj proklamis antaŭ ili ses punktojn de atentigo: 1) Parolu afable; 2) aĉetu kaj vendu juste; 3) redonu ĉion prunteprenitan; 4) pagu por ĉio de vi difektita; 5) redonu anstataŭmatracajn pajlojn en bone ligitaj faskoj; 6) resurmetu la prunteprenitajn pordklapojn. La postuloj elmetitaj de Prezidanto Maŭ estis koncizaj, klaraj, kompreneblaj kaj plenumeblaj por la batalantoj de la Ruĝa Armeo. Post kiam la Laborista Kamparana Ruĝa Armeo efektivigis tiujn postulojn en sia agado, rapide pliboniĝis la rilatoj inter la trupo kaj la amasoj, kaj inter la armeo kaj la popolo stariĝis tute nova solidara amikeco kiel inter fiŝoj kaj akvo.

Poste sub novaj kondiĉoj, al tiuj reguloj kaj punktoj estis daŭre faritaj aldonoj, reduktoj kaj ankaŭ revizioj en la enhavo, kaj tiel formiĝis "La Tri Ĉefaj Reguloj de Disciplino kaj la Ok Punktoj de Atentigo"* de nia Ĉina Popola Liberiga Armeo. De pli ol 40 jaroj, tiuj reguloj kaj punktoj, ellaboritaj persone de Prezidanto Maŭ, ĉiam estas la gvidilo por agado de nia armeo.

---

**Ili estas:* (*1*) *obeu ordonojn en ĉiuj agoj;* (*2*) *ne prenu de la amasoj eĉ kudrilon aŭ fadenon;* (*3*) *elliveru ĉian militakiraĵon; kaj* (*1*) *parolu afable;* (*2*) *aĉetu kaj vendu juste;* (*3*) *redonu ĉion prunteprenitan;* (*4*) *pagu por ĉio de vi difektita;* (*5*) *ne batu kaj insultu;* (*6*) *ne damaĝu plantaĵojn;* (*7*) *ne flirtu kun virinoj;* (*8*) *ne malbontraktu militkaptitojn.*

# Unu Peco da Meĉo

KIAM Prezidanto Maŭ gvidis la trupon suriri Ginggang-montaron post la Aŭtunrikolta Ribelo en 1927, la montaro estis ĉie blokadita de la malamikoj, kaj grandaj malfaciloj troviĝis en provizado de vestaĵoj kaj municio kaj eĉ de ĉiutagaj bezonaĵoj, kiaj rizo, oleo kaj salo. Prenu oleon kiel ekzemplon, ĝi estis bezonata en kuirado kaj lumigado..., tamen pro la rigora blokado de la malamikoj, oleo ne povis esti enportita en la montaron, kie produktiĝis nur kamelia oleo, cetere, en tre tre malgranda kvanto. Okaze iuj taĉmentoj subiris la montaron por bati lokajn tiranojn kaj akiris iom da oleo. Tio fariĝis granda valoraĵo.

Nelonge post la alveno al la montaro, Prezidanto Maŭ persone proklamis al la trupo regulon pri la uzo de oleo, kies ĝenerala enhavo estis jene: Ĉiu roto (same por la institucioj de bataliono kaj regimento aŭ pli superaj) rajtas uzi unu lampon kun tri pecoj da meĉoj dum laboro; sed la lampo devas esti tuj estingita post la fino de laboro. Por kontrolado de gardopostenoj fare de deĵorestro k. a. bezonoj, rotejo rajtas



Revolucia Moderna Pekina Opero

# Ruĝa Signal-lanterno

Kolektive adaptita de la Ĉina Pekin-opera Trupo

## SCENO 2
## RICEVO DE LA TASKO

La sama vespero.

La hejmo de Li Juhe. Vojo okupas trionon de la scenejo. La domo en la centro de la scenejo havas pordon en la dekstra muro kaj fenestron apud la pordo. En la mezo de la ĉambro estas kvadrata tablo kun lampo sur ĝi. Post ĝi estas terlito.

Kiam la kurteno leviĝas, norda vento ululas. En la ĉambro estas mallume. La avino lumigas la lampon per alumeto. Ventblovo bruas kaj skuas la fenestran paperon.

**Avino:** *Fiŝistoj povas venki ondojn kaj tempestojn,*
*Ĉasistoj ja ne timas la sovaĝajn bestojn.*
*Ĉu povas longe regi densa la mallumo?*
*La revolucio brilos certe kiel suno.*

Muziko. La avino ekskuas la kapon kaj murmuras: "Kial ankoraŭ ne revenas?" Ŝi iras al la tablo, prenas sian kudrilon kaj ekkudras.

Envenas Tiemej kun la korbo.

**Tiemej:** Avino!

**Avino:** Jam revenis! Ĉu estas malvarme al vi?

**Tiemej:** Ne! Avino, paĉjo diris ke onklo baldaŭ venos, li petas ke vi preparu manĝon. (*Ŝi metas la korbon.*)

**Avino:** Manĝo estas jam preta.

**Tiemej:** Kial mi havas tiom multe da onkloj, avino?

**Avino:** Multe da fratinoj via avo havis, do vi havas tiom da onkloj.

**Tiemej:** Kiu estas la onklo venonta ĉi-vespere?

**Avino:** Kial demandu? Vi vidos post lia alveno.

**Tiemej:** Eĉ se vi ne diras al mi, avino, mi tamen scias.

**Avino:** Kion vi scias?

**Tiemej:** Aŭskultu, avino.
*La onklojn plene nombri mi nur vane penas.*
*Sen grava kaŭzo ili ne al ni alvenas.*
*Kvankam parencoj vere tamen nekonatoj,*
*Sed ili estas karaj pli ol sangaj fratoj.*
*Avin' kaj paĉjo ilin nomas per karulo,*
*Mi la sekreton vidas iom en nebulo.*
*Ja same kiel paĉjo, ili ĉiuj tenas*
*Ruĝegan koron kiu je lumbrilo plenas.*

**Avino:** Kiom saĝa knabino.

Envenas Li Juhe kun la vundita kuriero sur sia dorso. Li malfermas la pordon kaj eniras. La avino kaj Tiemej haste helpas la kurieron al seĝo.

**Tiemej** (*Konsternite*): Ho!

Li Juhe signas al Tiemej ke ŝi gardu la straton.

**Tiemej:** Jes! (*Gardeme rigardas ekster la fenestron.*)

La avino prenas lavtukon. Li Juhe bandaĝas la vundon por la kuriero kaj donas al li akvon.

**Li kaj Avino:** Amiko, amiko!

**Kuriero:** Bonvolu diri al mi, ĉu tie ĉi sin trovas iu komutisto majstro Li?

**Li:** Tiu estas mi.

**Kuriero** (*volas diri kaj atente rigardas la avinon*) . . .

**Li:** Ne gravas. Vi povas diri!

---

havi unu lampon lumigatan, sed nur kun unu peco da meĉo. De tiam, la trupo sur Ginggang-montaro rigore plenumis tiun regulon. Kiam nokte eksonis klariono de enlitiĝo, la batalantoj tuj estingis la lampojn kaj en ĉiu roto lumis nur unu lampo kun sola peco da meĉo en la rotejo.

En la komenco, la batalantoj ne povis kompreni, kial Prezidanto Maŭ, kiu havis tiom multe da gravaj aferoj por prikonsideri, persone difinis tiun regulon ĝis la detalo de peco da meĉo. Poste ili ekkompreinis, ke tio ne estas bagatelo, sed granda afero fari revolucion kaj entrepreni aferojn kun ŝparema spirito por gajni venkon de la revolucia milito. Tio donis profundan edukon al la batalantoj de la Ruĝa Armeo. Nun ĝiaj veteranaj batalantoj el la periodo de Ginggang-montaro ĉiam tenas tion en la memoro.



**Kuriero:** Mi vendas lignajn kombilojn.

**Li:** Ĉu el persika ligno?

**Kuriero:** Jes, (*emocie*) sed oni devas pagi per kontanta mono!

**Li** (*kun ĝoja rigardo al la avino*): Bone, atendu.

La avino bruligas la malgrandan kvadratan lanternon kies unu flanko estas kovrita per ruĝa papero kaj ĝin montras al la kuriero.

**Kuriero** (*malesperiĝas ekvidinte la kvadratan lanternon, kaj baraktante stariĝas*): Ne, lasu min . . . foriri.

**Li** (*alte tenante la signal-lanternon*): Rigardu, kamarado!

**Kuriero** (*forte premante la manon de Li Juhe*): Jen fine mi trovis vin. (*Abrupte li svenis.*)

Tiemej transprenas la signal-lanternon. Ŝi miras pro ĝia efiko. La avino signas al ŝi ke ŝi atentu, ĉu io okazos ekster la fenestro.

**Li:** Kamarado . . .

**Avino:** Kamarado, kamarado . . .

La kuriero rekonsciiĝas.

**Kuriero:** Kamarado Li, mi estas . . . la kuriero . . . sendita . . . el la norda Manĉurio. (*Li pene ŝirfendas perbuŝe la subŝtofon de sia vatita jaketo, elprenas ĉifro-libron kaj donas ĝin al Li Juhe.*)

Tio ĉi estas . . . ĉifro-libro. (*spiregante*) Transsendu ĝin . . . rapide . . . al la gerila taĉmento de la Norda Monto. (*Spiregante en agonio*) Morgaŭ posttagmeze, ĉe la kaĉa budo en la bazaro de eluzitaj objektoj . . .

**Li:** Morgaŭ posttagmeze ĉe la kaĉa budo en la bazaro de eluzitaj objektoj . . . Kamarado, por kio ĉe la kaĉa budo en la bazaro de eluzitaj objektoj?

**Kuriero:** Tie tranĉil-akrigisto kontaktos kun vi . . .

**Li:** Ah, tranĉil-akrigisto kontaktos kun mi.

**Kuriero:** Samaj estas la signalvortoj kiel antaŭe . . .

**Li:** La samaj, jes . . .

**Kuriero:** Nepre plenumu la taskon, kamarado! (*Mortis.*)

Li Juhe deprenas sian ĉapon kaj rigardas la ĉifrolibron en sia mano. Ĉiuj tri funebre klinas siajn kapojn antaŭ la mortinto.

**Li:** Mi nepre plenumos la taskon!

Abrupte ekhurlas polica aŭto. La avino haste blovestingas la lampon.

**— La kurteno falas.**

## SCENO 3

## ELDANĜERIĜO ĈE LA KAĈA BUDO

La sekvantan posttagmezon.

Simpla kaĉovendista budo en la bazaro de eluzitaj objektoj. Ĉe la dekstra angulo staras kaduka longa tablo.

Kiam la kurteno leviĝas en bruado, tri homoj A, B, C manĝas kaĉon sidante; ĉe la elektrostango en la maldekstra angulo kolportistino laŭte ofertas cigaredojn. Envenas Li Juhe kun la lanterno en unu mano kaj manĝskatolo en la alia.

**Li:** *Kun la ĉifro-libro en la manĝskatolo,*
*Por la fraton trovi venas mi al la bazaro.*
*Mi ĝin nepre sendos al la Norda Monto,*
*Malgraŭ ĉia malfacilo, malgraŭ ĉia baro.*
(*Li eniras la budon kaj salutas al ĉiuj tie.*)
Bovlon da kaĉo, mastrino! (*Parolante pendigas la lanternon sur la dekstran kolonon.*) Kiel iras via negoco?

**Kaĉo-vendistino:** Pli malpli bone. (*Ŝi donas bovlon da kaĉo al Li.*)

C finmanĝis bovlon da kaĉo kaj stariĝis por foriri.

**Kaĉo-vendistino:** Ĉu ankoraŭ unu bovlon, frato?

**C:** Ne plu, dankon!

**Kaĉo-vendistino:** Ĉu unu bovlo sufiĉas por satigi vin?

**C:** Satigi? Mono mankas! Ej, ni laboras tuttage sed eĉ ne povas sate manĝi kaĉon. Jen kiel statas la socio. (*Foriras.*)

Envenas alia homo D.

**D:** Bovlon da kaĉo, mastrino.

La virino donas bovlon da kaĉo al D.

**D** (*prenas plenbuŝon da kaĉo*): Ej, kiel odoraĉas via kaĉo? Ĝi mucidas!

**A:** Ĝi estas el distribuita rizo.

**Kaĉo-vendistino:** Kion fari! Toleri oni devas.

**B:** Hej, kio estas tio en la kaĉo? Ĝi preskaŭ rompis mian denton.

**A:** Hm! Ĝi plenas de sableroj.

**Kaĉo-vendistino:** El distribuita rizo! Kion fari! Toleri oni devas!

**B:** Hm! Oni simple ne traktas nin kiel homojn!

**A:** Ŝŝ! Ne laŭtu, alie vin trafos malfeliĉo.

**B:** Ej! (*Profunde ĝemspiras*) Ĉu ĝi estas kaĉo! Kiel oni povas ĝin manĝi!

**Li:** *Kiom da kunfratoj grumblas pro mizero,*
*Sub ferhufoj baraktadas en furikolero,*
*Kaj atendas la ekbruon de printempa tondro,*
*Ja heroaj ĉinoj sin ne ŝafoj montros!*
*Frue venu fratoj de la Norda Monto* —

Envenas la tranĉil-akrigisto kun stablo surdorse.

**Tranĉil-akrigisto:** *Por la fraton trovi serĉas mi en rondo.*
*Jen lanterno ruĝa alte sendas brilon.*
*Kiu bezonas min akrigi sian tranĉilon!*

**Li:** *La akrigisto la lanternon jen observas,*

La tranĉil-akrigisto bruligas cigaredon, forjetas la alumeton kaj signas al Li Juhe per la maldekstra mano en blua ganto.

**Li:** *Kaj l' maldekstran manon signe al mi levas.*
*Ŝajne babilante mi la signalvortojn diras.*

Antaŭ ol Li Juhe povas interŝanĝi signalvortojn kun la akrigisto, subite aŭdiĝas akra hurlo de polica aŭto kaj japanaj ĝendarmoj alkuras.

**Ĝendarmoj:** Ne moviĝu!

La tranĉil-akrigisto intence faligas sian stablon por altiri al si la atenton de la japanoj.

**Li:** *Por min savi li la lupojn al si loge tiras.*

(*Li verŝas la restantan kaĉon en sia bovlo en la manĝskatolon kaj poste petas la vendistinon enverŝi ankoraŭ unu kuleregon da kaĉo.*)

Tiam la ĝendarmoj jam finis serĉadon al la tranĉil-akrigisto kaj mansvingas riproĉe ke li iru for.

La japanaj ĝendarmoj turnas sin al Li Juhe.

Li donas unue la manĝskatolon kaj poste la lanternon al la japanoj sed ĉi tiuj repuŝas ilin.

Li metas ilin sur la tablon kaj lasas la ĝendarmojn traserĉi lin.

**Ĝendarmo A** (*fininte la traserĉadon*): For!

Li Juhe prenas siajn manĝskatolon kaj lanternon kaj foriras. Mallumiĝo.

**— La kurteno falas.**

---

# Inter Ni

## LETERO DE K. N. (OKCIDENTA GERMANIO)

Kiel longjara leganto mi ne bezonas substreki, ke la enhavo ĉiam ege plaĉas al mi. Speciale la unua artikolo "Ruĝa Flago Flirtas sur Ĉajaŝan-montaro" (en EPĈ n-ro 8-9, 1968 —La Red.) estas tre interesa. En iama malriĉa regiono nun funkcias nova popolkomunumo laŭ la direktivoj de via granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

El la statistikaj nombroj oni vidas, ke la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj sukcesis rekonstrui la ekonomion de tiu ĉi iama dezerta regiono. Helpe de abundo de milionoj da kubmetroj da akvo, vi nun havas fruktdonan popolkomunumon. Oni vidas, ke la revolucia spirito de "Malsaĝa Avo" inspiris la popolon venki la malfacilaĵojn de la naturo. La malamikoj, ĉefe la usonaj imperiistoj, ne ŝatas la kreskadon de la nova Ĉinio.

Plezure mi rigardis la bildon sur la kovrilo. La aspekto de tiu ĉi juna kamaradino Hju Hingdi donas garantion, ke milionoj da revoluciaj gejunuloj samspirite estas pretaj defendi la atingaĵojn de la Popola Ĉinio, samtempe defendante la mondan revolucion. La juna vizaĝo de Hju montras profundan malamon al la malamikoj, kaj absolutan konvinkon, ke la fina batalo estos sur la flanko de la revolucia Ĉinio kaj monda proletaro.

La du kalendarojn mi bone ricevis. Ankaŭ la ilustritajn kartojn. Koran dankon.

## LETERO DE F. N. (SVEDIO)

Mi vere gratulas la Ĉinan Esperanto-Ligon pro ĝia tiel bona kaj bela revuo kiel *El Popola Ĉinio*. Ankoraŭ pli bona post la ĉiumonata aperado. Belaj bildoj, bone redaktita kaj interesa enhavo.

Estanta kamparano mi ŝatas legi pri la progresoj de la ĉina agrikulturo, bestobredado kaj ĉio alia kio rilatas al agrikulturo. Mi tre interesiĝas legi pri tio.

# Flugfolio de la Sovetunia Grupo "Stalin"

*Lastatempe la sovetunia grupo "Stalin" disvastigis flugfolion titolitan "Laŭ la Vojo de Stalin", alvokante la proletaron kaj laborantajn popolanojn de Sovetunio al batalo por renversi la regadon de la sovetunia reviziisma renegata kliko kaj restarigi la diktaturon de la proletaro.*

*La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ montris:* **"Sovetunio estas la unua socialisma ŝtato, kaj la Komunista Partio de Sovetunio estas partio kreita de Lenin. Kvankam la gvidanteco de la Partio kaj ŝtato en Sovetunio estas nun uzurpita de reviziistoj, tamen, mi konsilas kamaradojn firme kredi, ke la vastaj amasoj de popolo kaj partiaj membroj kaj kadroj de Sovetunio estas bonaj kaj deziras revolucion, kaj ke la regado de reviziismo ne longe daŭros."**

*Ni firme kredas ke la antaŭdiro de Prezidanto Maŭ certe efektiviĝos.*

*Nepre venkos la vastaj amasoj de la sovetuniaj revoluciaj popolanoj!*

*Nepre malvenkos Ĥruŝĉov, Brejnev, Kosigin kaj similaj!*

**— La Red.**

En la flugfolio estas skribite:

La profundaj ŝanĝiĝoj okazintaj en nia lando dum la lastaj 15 jaroj — la jaroj de potenctenado de ĥruŝĉov-brejneva superularo — estas rimarkitaj de ĉiuj. Sed, ne ĉiuj vidas la veran enhavon de tiuj ŝanĝiĝoj. Ŝanĝiĝis la karaktero de regpotenco en Sovetunio, ŝanĝiĝis ankaŭ la politiko, ideologio kaj ekonomio de la ŝtato. La evidentaj rezultoj de tiuj ŝanĝiĝoj estas splitiĝo de la komunisma movado, izoliĝo de Sovetunio kaj plena perdo de prestiĝo kaj malfacila stato en la lando. Tamen la ĥruŝĉov-brejneva reĝimo provas kovri sian bankroton per demagogio de siaj politikistaĉoj, distrumpetas neekzistantajn venkojn kaj atingojn. La malkontento kaj premo de la laboristoj kaj kamparanoj devigas la regantan superularon doni iom da almozo al la laborantaj popolanoj, kaj per tio ĝi tenas sian ŝanceliĝan pozicion kaj konservas siajn privilegiojn kaj komforton je la kosto de laboristoj kaj kamparanoj.

**KAMARADOJ! RIGARDU LA ESENCON! NE ESTU TROMPITAJ DE MALPLENAJ VORTOJ DE BREĴNEV KAJ ALMOZOJ DE KOSIGIN!**

La fundamenta rezulto de agado de ĥruŝĉov-brejneva reĝimo en la 15 jaroj de ĝia ekzistado estis fondiĝo de reganta ekspluata kasto reprezentanta interesojn de la burĝaro sur bazo de kombiniĝo de superularo de intelektuloj kaj heredaj intelektuloj kun tiu de la partiaj kaj ŝtataj aparatoj apartiĝinta de la popolo. Tiu aroganta tavolo riĉiĝas je la kosto de la laborista klaso, sed ĝi ŝajnigis ke ĝi batalas por la interesoj de la laborista klaso. Por tiuj, vere batalantaj por la interesoj de la laborista klaso, ne necesas privilegioj kaj komforta vivo per prirabado al laboristoj kaj kamparanoj. La reganta superularo jam delonge ĉesis servi al la popolo, fariĝis parazita tubero sur la korpo de la popolo kaj strangolas la popolon.

**LABORISTOJ! BATALU KONTRAŬ ĈIUJ PRIVILEGIOJ! KONTRAŬ EKSPLUATADO DE REGANTA KASTO — KASTO DE NOVAJ BURĜARAJ "MASTROJ"!**

La reganta kasto kuraĝigis aktivan importadon de burĝara ideologio kaj burĝara kulturo. Tio estas bezonata de ĝi ne nur por propra ĝuo, sed antaŭ ĉio por "reformi" la konscion de la laboristoj kaj kamparanoj, sufoki la revolucian spiriton de la laborista klaso kaj per tio akomodi la laboristan klason en efika utiligado al la kastaj interesoj. Por disvastigi koruptantan ideologion de la burĝar-filistraj individuismo, egoismo kaj seksismo la reganta kasto utiligas intelektulojn. Multe da intelektuloj sekvas sian "avangardon" — la regantan burĝaran ekspluatan kaston, konstante aldonante ĝin. Intelektuloj estas nun grundo por oportunismo kaj burĝara degenero, konstanta bazo kaj unika fidinda apogilo de la reganta kasto. Jen kial anstataŭ enplantadi la proletaran klasan konscion inter intelektuloj, la reviziisma reganta kasto klopodas "levi" la laboristan klason al nivelo de la burĝara intelektula ideologio strikte kuniĝanta kun la ideologio de la burĝaro. Tial nia slogano estas:

**ELRADIKI LA BURĜARAN INTELEKTULAN IDEOLOGION KAJ ENPLANTI LA PROLETARAN IDEOLOGION!**

La reviziisma reganta kasto klopodas inokuli al laboristoj la penson, ŝajne, ke la interesoj de la laboristoj kuŝas ekster la politiko, ke la laboristoj ne koncernas la politikon, ke la plej grava por laboristo estas persona feliĉo, kaj ke la politiko estas afero de la superuloj, sed ne de la laboristaj amasoj. La tiel nomata linio de ĥruŝĉov-breĵneva ekonomiismo estas rimedo neniigi la politikan rolon de la laborista klaso kaj rimedo antaŭenpuŝi la kastan politikon, havantan nenion komunan kun la politiko proletara. La laborista klaso estas giganta revolucia forto, kiun ĝuste timas la ĥruŝĉov-breĵnevaj ĉefoj perdintaj la lastajn pecetojn de revolucieco, klaseco kaj internaciismo de la proletaro.

**DEPRENI LA DIREKTILRADON DE POLITIKO EL LA MANOJ DE TIU KASTO ESTAS GLORA AFERO DE LA LABORISTA KLASO.**

La ekspluata kasto kaj ĝin ĉirkaŭanta tavolo plej timas mencii helpon, subtenon kaj defendon al la monda revolucio, ĉar plifortigo de helpo kaj subteno al la revoluciaj movadoj de la mondo postulas de ĝi forlasi siajn privilegiojn. Anstataŭ doni rebaton al la agreso de imperiismo, haltigi eksporton de kontraŭrevolucio kaj subteni armitan batalon de diverslandaj popoloj por liberiĝo, la kasto praktikas politikon de "paca" interkonsento kaj de cedoj al imperiismo. Tia politiko — politiko de kapitulaco al imperiismo — faras Sovetunion bremso de la monda revolucio.

**FALIGU LA KASTAN POLITIKON DE KAPITULACO KAJ RETIRIĜO! VIVU LA PROLETARA POLITIKO DE REVOLUCIA OFENSIVO!**

Ĉia ajn regpotenco havas klasan karakteron. La ĥruŝĉov-breĵneva superularo likvidis efektive la diktaturon de la proletaro en Sovetunio kaj "leĝigis" la likvidon, kaj anstataŭinte tiamaniere la regpotencon de la laborista klaso per la diktaturo de la kasto de burĝaraj degeneruloj. La unika formo de regpotenco staranta kontraŭ la diktaturo de la burĝaro estas la diktaturo de la proletaro.

**FALIGU LA DIKTATURON DE LA KASTO DE BURĜARAJ DEGENERULOJ! SIN ĴETU EN LA BATALON POR RESTARIGI LA DIKTATURON DE LA PROLETARO EN SOVETUNIO!**

La karaktera specifikeco de la reganta kasto estas pene klopodi kaŝi de la popolo siajn malpurajn agadojn kaj ilin ŝirmi per la nomo de Lenin. Dum la 15 jaroj la kasto fuŝe uzas kaj malpurigas la nomon de Lenin, kaj estas jam sufiĉe klare, ke la linio de la reganta kasto havas nenion komunan kun leninismo.

**KAPABLI DISTINGI LA VERAJN LENINISTOJN DISDE TIUJ KIUJ ŜIRMAS SIN PER LA NOMO DE LENIN! KURAĜE MALKAŜI PERFIDON DE LA REVIZIISMA REGANTA KASTO — KASTO DE DEGENERULOJ!**

Sin ŝirmante per Lenin, la reganta superularo kalumnias la grandan leniniston I. V. Stalin. Tiu malpura kalumnio mem ne estas la celo. Senkreditigi Stalin estas taŭga preteksto por revizii la revolucian linion de Stalin, kaj ĝin anstataŭi per kapitulaca politiko, burĝara ideologio kaj ekspluata ekonomio. Tio ja estas la vera celo de tiu ĉi kasto.

**BATALU POR FRAKASI ĤRUŜĈOV-BREĴNEVAN REVIZIISMON! BATALU POR REVIVIGI LA SPIRITON DE STALIN, LA AFERON DE STALIN KAJ LA GLORON DE STALIN!**

La modernaj reviziistoj — burĝaraj degeneruloj en Sovetunio — verŝas malpurajn kalumniojn al la Komunista Partio de Ĉinio kaj ĝiaj gvidantoj kaj subtenas proĥruŝĉovan opoziciularon kontraŭ la revolucia linio de la Komunista Partio de Ĉinio provante ekblovigi enlandan militon en Ĉinio.

**LA MANOJN FOR DE LA POPOLA ĈINIO!**

Breĵneva superularo hipokrite deklaras pri sia sopiro al "unuiĝo de ĉiuj revoluciaj fortoj", ekskluzivante el tiu "unuiĝo" ĉiujn verajn revoluciajn fortojn. Estas klare, ke la breĵnevistoj klopodas por unuiĝo ĉirkaŭ sia kapitulaca linio, provas devigi la revoluciajn fortojn rezigni la batalon kontraŭ imperiismo, fari ilin el kontraŭimperiismaj fortoj en fortojn "pace kunekzistantajn" kun imperiismo.

**KONTRAŬ LA HEGEMONIO DE REVIZIISMO, POR GVIDANTECO DE MARKSISMO! POR DISVOLVO DE LA REVOLUCIO EN LA TUTA MONDO! UNUIĜU LA PROLETOJ DE ĈIUJ LANDOJ SUB LA STANDARDO DE MARKSISM-LENINISMO! UNUIĜU LA PROLETOJ KAJ SUBPREMATAJ POPOLOJ DE LA TUTA MONDO EN LA REVOLUCIA BATALO KONTRAŬ IMPERIISMO!**

# Nova Caro

JONG VEJDONG

EN la cara Rusio, la caro ludis la rolon de "la ĝendarmo de Eŭropo". Nun grandnombraj faktoj pruvas, ke la sovetunia reviziisma renegata kliko estas la plej granda kolonia reganto kaj plej granda ekspluatanto de la popoloj de la orienta Eŭropo kaj nova caro rajdanta sur ilia dorso. La agreso, kontrolado kaj prirabado fare de la sovetunia reviziisma renegata kliko al aliaj membroj-landoj de la "Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo" kaj la invado al Ĉeĥoslovakio jam disŝiris la figfolion de la de ĝi fanfaronitaj "respekto al la suvereneco kaj naciaj interesoj" kaj "egaleco kaj reciproka utilo" kaj komplete malkovris ĝian trompan babilaĵon pri la tiel nomata "protekto al la granda socialisma familio".

La sovetunia reviziisma renegata kliko jam delonge degeneris en social-imperiismon. La "Varsovia Traktato" estas ĝia instrumento por manipuli la orienteŭropajn landojn kiel en politiko tiel ankaŭ en militaj aferoj kaj praktiki sian social-imperiisman agresan politikon. Ankaŭ la "Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo" jam delonge fariĝis ilo en ĝia mano por kontroli la financon kaj ekonomion de tiuj landoj kaj sklavigi kaj prirabi la popolojn de la orienta Eŭropo.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **"Kvankam la imperiismaj registaroj faris ĉiutage kontraŭrevoluciajn aferojn, tamen ili ĉiam plenigis siajn buŝojn kaj oficialajn dokumentojn per humaneco, justeco kaj virto aŭ almenaŭ spicis ilin per humaneco,**

**justeco kaj virto, kaj ili neniam diris la veron.''** Ĝuste tia estas la sovetunia reviziisma social-imperiismo. Ĝi evidente utiligas la "Konsilantaron de Ekonomia Interhelpo" por praktiki grandregnan ŝovinismon, nacian egoismon kaj novan koloniismon kaj kruele ekspluati kaj prirabi la popolojn de la orienta Eŭropo, sed en multaj oficialaj dokumentoj ĝi babilaĉas per mielaj vortoj ke la "Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo" celas "ĉiuflankan kunlaboron en ekonomio, scienco kaj tekniko" inter siaj membroj-landoj sur la bazo de "la fundamentaj principoj de internacia socialisma divido de laboro" kaj de la "principoj de plena egaleco, respekto al la suvereneco kaj naciaj interesoj kaj reciproka utilo kaj kamaradeca helpo". Sed la sovetunia popolo kaj popoloj de la orienta Eŭropo kaj revoluciaj popoloj de la mondo ĉiam pli klare vidas, ke la sovetunia reviziismo kaj la usona imperiismo estas varoj de la sama speco en esenco.

Por antaŭenpuŝi la tiel nomatan "internacian socialisman dividon de laboro", la sovetuniaj reviziistoj multe klopodis por fabriki kontraŭrevolucian publikan opinion. Ili diris, ke "la konstante kreskanta rapideco de teknika progreso nun limigas la eblecon al kompare malgrandaj landoj solvi per siaj propraj fortoj sufiĉe grandan nombron da komplikaj problemoj", ke "rezulte de nesufiĉa amplekso de internaj merkatoj multaj landoj de la Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo ne povas garantii sufiĉan ekonomian efikecon de nacia ekonomio sur la bazo de alta laborproduktiveco, de vasta utiligo de modernaj maŝinoj, ekipaĵo kaj teknologiaj procezoj", ke tiuj landoj "suferas mankon de sciencaj kaj projektantaj kadroj". Laŭ la logiko de la sovetunia reviziisma renegata kliko, la malgrandaj landoj devas dependi de la grandaj kaj fariĝi iliaj ekonomiaj alpendaĵoj kaj kolonioj; la malgrandaj landoj povas fariĝi nur liverantoj de krudaj materialoj al la grandaj landoj por ke la lastaj disvolvu sian industrion. Ĉu tio ne estas centpocenta rabista logiko de imperiismo?

El multnombraj faktoj ni povas vidi, ke la tiel nomata "internacia divido de laboro" praktikata de la sovetunia reviziisma renegata kliko en la orienta Eŭropo estas esence "divido de laboro" inter la sklavigantoj kaj sklavigatoj, inter la ekspluatantoj kaj ekspluatatoj, inter la prirabantoj kaj prirabatoj, t. e. "divido de laboro" inter la social-imperiisma metropolo de sovetunia reviziismo kaj ĝiaj kolonioj. Tia "divido de laboro" neniom diferencas de tiu inter la usona imperiismo kaj ĝiaj multaj koloniaj kaj duonkoloniaj landoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko.

El multaj faktoj ni povas vidi ankaŭ, ke la tiel nomata "specialigo de produkto" praktikata de la sovetunia reviziisma kliko en la orienta Eŭropo estas esence kripligo de produkto, t. e. koloniigo de produkto. La kondukata de ĝi "kooperigo de produkto" estas efektive "ĉiuflanka kunlaboro" inter la sovetunia reviziisma kliko kaj la reviziismaj klikoj de la orienta Eŭropo en subpremado, ekspluatado kaj prirabado al la popoloj de la orienta Eŭropo. La de ĝi tiel nomata "ekonomia integrado" estas fakte koloniigo de la aliaj membroj-landoj de la "Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo". Tio neniom diferencas de la "ekonomia integrado" efektivigata de la usona imperiismo en Latinameriko.

Prezidanto Maŭ Zedong jam montris delonge: **"La socialisma sistemo finfine anstataŭos la kapitalisman sistemon, tio estas objektiva leĝo sendependa de homa volo. Ne gravas kiel ajn la reakciuloj provas reteni la radon de historio, frue aŭ malfrue revolucio nepre okazos kaj certe triumfos."** La sovetunia reviziisma renegata kliko efektivigas kapitalisman restaŭron en diversaj landoj de la orienta Eŭropo per la kontraŭrevoluciaj "Varsovia Traktato" kaj "Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo" por ke la lastaj fariĝu ĝiaj kolonioj kaj dependaj landoj. En politiko, la sovetunia reviziismo senbride piedpremas la suverenecon kaj sendependecon de aliaj membroj-landoj de "Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo", kaj krude intervenas en la en- kaj ekster-landajn politikojn de tiuj landoj; kaj en ekonomio ĝi sklavigas kaj prirabas la popolojn de tiuj landoj, kaj en militaj aferoj ĝi praktikas armitan kontrolon, eĉ ekspedis trupojn por agresi kaj fabrikis marioneton per bajoneto. Tiuj faktoj edukis la popolamasojn, ebligis al la sovetunia popolo kaj popoloj de la orienta Eŭropo pli profunde koni la kontraŭrevolucian naturon de la sovetunia reviziisma social-imperiismo kaj la reviziismaj regantaj klikoj de la orienta Eŭropo kaj ebligis al la revoluciaj popoloj de la mondo pli klare vidi la reakcian vizaĝon de la moderna reviziisma kliko kun la sovetunia reviziismo kiel la ĉefo. La sovetunia popolo kaj popoloj de la orienta Eŭropo kun glora revolucia tradicio nun troviĝas en nova vekiĝo. Same kiel la imperiistoj kun la usona imperiismo kiel la ĉefo, la modernaj reviziistoj kun la sovetunia reviziisma renegata kliko kiel la ĉefo sin trovas en sennombraj kontraŭdiroj, dissplitiĝo kaj senprecedenca izoliĝo. Jam nemalproksima estas la tago, kiam ilin entombigos la revoluciaj popoloj de la mondo!

# "Premioj" de la Sovetunia Reviziismo Plenigas Poŝojn de la Privilegia Tavolo

La sovetunia reviziisma renegata kliko senhonte fanfaronis, ke la nun de ili energie antaŭenpuŝata enlande t. n. "nova sistemo de ekonomio", kiu gvidas ĉion per la profita principo de kapitalismo, portas rimarkindajn avantaĝojn al la laboristaj amasoj. Ĉar ju pli multe gajnas monon la fabrikoj, des pli multiĝas la premioj al la laboristoj.

Ĉu vere plimultigas al la laboristoj la enspezon la premioj uzataj de la sovetunia reviziismo en fabrikoj kiel rimedo de materia stimulado? Ne, tute ne. Lastatempe la sovetunia reviziisma gazeto *Problemoj de Ekonomio* publikigis du artikolojn pri premioj de la laboristoj kaj oficistoj. La artikoloj mem konfesas, ke nun la absoluta plejparto el la premioj en fabrikoj de Sovetunio fluas en poŝojn de la privilegia tavolo.

La artikolo de la *Problemoj de Ekonomio* diras: "La sperto de laboro de la entreprenoj, transirintaj la unuaj al nova sistemo de planado kaj ekonomia stimulado, montris, ke plimulto de entreprenoj uzis monrimedon de fonduso de materia premio el profito ĉefe por altigi la laborpagon de inĝenier-teknikaj laborantoj kaj oficistoj. Oni prenu kiel ekzemplon la 704 entreprenojn, transigitajn al novaj kondiĉoj de laboro en 1966. La porcio de la laboristoj en monrimedoj, prenitaj el profito por kuranta premiado, konsistigis 18.1%, kaj tiu de la inĝenier-teknikaj laborantoj kaj oficistoj — 81.7%.

Koncerne al la laboristoj, la proporcio de ties premioj en laborpago estis multe malpli alta ol tiu de premioj de teknikaj laborantoj. Tion bone klarigis la stato de du unuigitaj konfekciaj entreprenoj "Lelija" kaj "Bolŝevikino", kiujn ankoraŭ priparolas la artikolo de la *Problemoj de Ekonomio*. Post efektivigo de la premia sistemo de la "nova sistemo de ekonomio", "rezulte de kresko de la monata meznombra salajro de inĝenier-teknika laboranto en 1966 kompare kun 1965 respektive je 24.6% kaj 20%" en tiuj du fabrikoj, "la salajro de laboristo en tiuj entreprenoj plimultiĝis nur je 6.4% kaj 12.2.%". La artikolo ankaŭ malkaŝas, ke kvankam tre malalte estas difinita la proporcio de premioj de ĉiuj entreprenoj en laborpago de la laboristoj, tamen eĉ tiuj sensignifaj premioj ankoraŭ estas dekalkulitaj kaj ne povas veni en la manojn de la laboristoj.

La salajra sistemo enlande praktikata de la sovetunia reviziismo ja denaske estas sistemo per kiu la plenmano da privilegia tavolo intensigas ekspluatadon al laboristoj. Kaj nun, la premia sistemo difinita de la "nova sistemo de ekonomio" pluapaŝe rabas la laborfruktojn de la vastaj laboristaj amasoj, ĉiam pli grasigas la plenmanon da privilegia tavolo kaj rapidigas distavoliĝon de la socio en Sovetunio.

Sed la sovetunia reviziisma renegata kliko eĉ senhonte deklaris, ke estas tute racia tiu ilia premia sistemo. La artikoloj de la *Problemoj de Ekonomio* ja plenenergie serĉas "teorian argumenton" por la privilegia tavolo de entreprenoj kiu forprenas absolutan plejparton de premioj, kriante ke "senbaze estas malaltigi premiojn de la inĝenier-teknikaj laborantoj", ĉar iliaj "kontribuoj diferencas" de tiuj de la laboristoj. Tio refoje montras, ke la sovetunia reviziisma renegata kliko, kiu kantas buŝe altan melodion "reprezenti interesojn de la laborista klaso", estas de la kapo ĝis la piedoj nova burĝaro, estas la plej feroca malamiko de la sovetunia laborista klaso.

Internacia Revuo

## BRAVE BATALAS LA GERILAJ TAĜMENTOJ DE PALESTINO

Laŭ la resumaj militaj komunikoj en oktobro 1968 publikigitaj respektive de *Al Fatah* (La Palestina Naciliberiga Movado) kaj Palestina Liberiga Organizo, la gerilaj taĉmentoj de Palestino gajnis novajn venkojn en sia brava batalado kontraŭ la izraela agresa armeo en tiu ĉi monato.

La komuniko de *Al Fatah* diris, ke sur la okupitaj arabaj teritorioj Assifa-taĉmento faris sinsekve 110 atakojn kontraŭ la izraelaj agresantoj, mortigis kaj vundis sume ĉirkaŭ 600 agresantojn, detruis 5 observejojn kaj 10 apogpunktojn, inkluzive de unu klubo de izraelaj oficiroj apud la Morta Maro, detruis 20 tankojn kaj minbalaajn veturilojn, 88 militveturilojn kaj 14 kanonojn, kaj militkaptis 5 kanonojn kun diversaj kalibroj. Krome, la taĉmento ankaŭ bombis la ĉefan domon de izraela internacia aerodromo, 6 partojn de fervojo kaj pontojn, kelkajn petrolajn cisternojn kaj konduktubojn kaj du grandajn fabrikojn.


La komuniko de la Palestina Liberiga Organizo diris, ke ĝiaj gerilaj taĉmentoj faris 30 atakojn kontraŭ la izraelaj agresantoj en oktobro, mortigis kaj vundis ĉirkaŭ 230 agresantojn. Krome, ili ankaŭ militkaptis unu oficiron kaj unu spionon de izraela informistaro, paffaligis unu izraelan helikopteron, detruis tri pezajn tankojn, 22 duonraŭpirajn ĵipojn, 8 transportajn veturilojn kaj ankaŭ 3 kazernojn kaj munician tenejon kaj unu observejon.

Tiuj venkoj forte batis la arogantecon de la usona imperiismo kaj ĝia komplico en ilia freneza milita provoko, kaj multe kuraĝigis la palestinan kaj aliajn arabajn popolojn en ilia heroa batalo por liberigi la okupitajn teritoriojn.

## STRIKO DE ARGENTINAJ LABORSITOJ

De la fino de septembro 1968, 7,800 laboristoj de "Laplata", la plej granda ŝtata olea rafinejo en Argentino, strikas sen fiksa tempodaŭro por protesti la plilongigon de la labortago kaj aliajn intensigojn de ekspluato al laboristoj fare de la dunganto. Dum la strikado, la reakcia aŭtoritato perforte fermis la du sindikatojn de la rafinejo kaj ekspedis grandajn nombrojn da infanterianoj, policistoj, policaj hundoj kaj aŭtoj, kaj eĉ helikopteron kiu ĉirkaŭflugis malalte, super la rafinejo, por subpremi kaj minaci la laboristojn. Samtempe, la rafinejo maldungis pli ol 150 laboristojn por subfosi la strikon. Sed, neniom timigite, la strikantaj laboristoj persistas en batalo.

*Gerilaj taĉmentoj de Palestino senĉese disvolviĝas kaj plifortiĝas en la batalo. Jen estas palestinaj gerilanoj en trejnado por praktika batalado.*





*Popolamasoj de Buenos-Aires, la ĉefurbo de Argentino, brave kondukas protestan manifestacion spite al malhelpo de la reakciaj armeo kaj polico.*

## PROTESTO DE KOLOMBIAJ STUDENTOJ KONTRAŬ LA REAKCIAJ PAŜOJ DE LA AŬTORITATO

La kolombiaj studentoj okazigis sinsekvajn manifestaciojn por protesti reakciajn paŝojn de la reakcia aŭtoritato.

Foje, centoj da studentoj de Bokota, la ĉefurbo de Kolombio, okazigis kunvenon en universitata kvartalo indigne protestante kontraŭ la reakcia eduka leĝprojekto publikigita de la registaro. La reakcia aŭtoritato ekspedis grandan nombron da policistoj kiuj ĉirkaŭis la universalan kvartalon kaj entrudiĝis en la universitatojn kaj senbride subpremis la manifestaciantajn studentojn. La heroaj kaj neflekseblaj studentoj forte rebatis per ŝtonoj la atakojn de la policistoj.

Antaŭ tio, la studentoj de Ŝtata Universitato de Kolombio jam brave sturmis la prezidantan domon por protesti, ke la aŭtoritato permesis usonan "profesoron" fari en tiu universitato kulturan enfiltriĝon sub la nomo de instruo.

## KANADAJ AMASOJ INDIGNE BRULIGIS NACIAJN STANDARDOJN DE LA USONA IMPERIISMO

Je la fino de oktobro pasintjare, la kanadaj amasoj sinsekve okazigis amasajn manifestaciojn en Otavo, Toronto, Vancouver, Winnipeg, Calgary, Halifax kaj aliaj urboj, por protesti agresadon de la usona imperiismo al Vjetnamio. En Vancouver kaj Winnipeg, la manifestaciantoj bruligis usonajn naciajn standardojn antaŭ la usona konsulejo. En Toronto, ĉirkaŭ 700 manifestaciantoj luktis kontraŭ policistoj venintaj por subpremado, kaj dekoj estis maljuste arestitaj.

*Sur la kovrilo:*

Ĝojo pro riĉa rikolto

*Sur la dorskovrilo:*

Junaj intelektuloj en la Norda Virgejo laboras sur kampoj por batali kontraŭ plantmalsanoj kaj malutilaj insektoj.


# EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 2 (127) 1969


## Ĉefa Enhavo


Ĉiam Konservu la Junecon de Proletara Revoluciulo

Subenirintaj Kadroj en la Kamparo

"Maljuna Guo Ligiĝas kun Ni Koro kun Koro"

Ĉiam Esti Ordinara Popolano

Ordinara Soldato

Verkoj de Maŭ Zedong Broŝure Eldonitaj en Esperanto

Alta Produktkvanto de Kotono en Turfan

Nova Moro en Familio

Pri Foiro de Eksportaj Varoj de Ĉinio

Vinberoj de Turfan

Ni Estas Atestantoj de la Historio

Vizaĝo de Lakeo

Al Diabloj la Tezo de Liu Ŝaŭki "Aliĝi al Kompartio por Fariĝi Estro"!

Ruĝa Signal-lanterno (*Pekina Opero*)

Flugfolio de la Sovetunia Grupo "Stalin"

Nova Ĉaro

"Premioj" de la Sovetunia Reviziismo Plenigas Poŝojn de la Privilegia Tavolo


# Suĝoŭ-brodaĵo "Oŭjang Haj"

La senprecedenca granda proletara kultura revolucio prilumas la revolucian vojon por la brodo de nia lando. La metiarto Suĝoŭ-brodaĵo prosperas en Suĝoŭ kaj Hangĝoŭ de la malsupra baseno de Jangzi-rivero. Pro tio ke ĝiaj vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj persistas en la direkto montrita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ke la literaturo kaj arto devas servi al la proletara politiko kaj al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, ili kreis multajn verkojn, kiuj prikantas Prezidanton Maŭ, propagandas la penson de Maŭ Zedong kaj spegulas la novan fizionomion de la socialisma socio, tiel ke ili radias la brilan lumon de la penso de Maŭ Zedong per tiu tradicia arto kun longa historio.

La Suĝoŭ-brodaĵo "Oŭjang Haj", kiun montras tiu ĉi bildo, vivece prezentas per delikata brodarto la bravan agadon de la heroo Oŭjang Haj kiu sub la nutrado de la penso de Maŭ Zedong kuraĝe forpuŝis de la fervojo la teruritan ĉevalon senkonsidere pri sia sekureco por savi la tutan vagonaron.







*Supre:* Laboristoj estas en studado.

*Malsupre:* La laboristinoj estas en laborado.

*Dekstre:* La eskaprada grupo sin ĵetas en novan batalon post antaŭdata plenumo de la produkta plano.



# Tiangin-a Brakhorloĝa Fabriko

En la granda proletara kultura revolucio, la vastaj amasoj de revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Tiangin-a Brakhorloĝa Fabriko, strikte sekvante la grandan strategian dispozicion de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, entuziasme tenas la revolucion kaj stimulas la produkton, tiel ke ilia spirita fizionomio plene noviĝis kaj la produkto fluge disvolviĝas.



